

Zagreba Esperantisto

ISSN 1846-5021

GAZETO DE
ZAGREBAJ ESPERANTISTOJ

ԹՈՒՆԵՅԱՌ
ՅԵՂՈՅՆՈՒՄՈՒՑՈՒՅ

Ĉi-numere legu pri:

MIA VIVO KUN IVO LAPENNA

BIBLIOTEKOJ KAJ ARKIVOJ

FONDO DE ESPERANTO-SOCIETO EN SISAK

INTERESAĴOJ DE "NAŠIČKI ZBORNIK"

JARKUNVENO EN SPLIT

NEKONATA ESPERANTISTO LOVRO KIŠ

2

2008

Zagreba Esperantisto

Numero 2 (6)

Jaro II

marto 2008

<http://zagreba-esperantisto.blogger.hr/>

Eldonanto:

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj
HR-10000 Zagreb, Goljak 43

Ĉefa redaktoro:

Josip Pleadin
B. Jelačića 138 A
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
josip.pleadin@gmail.com

Respondeca redaktoro:

Radenko Milošević
Goljak 43
HR-10000 Zagreb
radenko.milosevic@zg.htnet.hr

Redaktejo kaj ekspedejo:

Grafokom, p.p. 96
HR-48350 Đurđevac
Kroatio
grafokom@kc.htnet.hr
zagreba.esperantisto@gmail.com

Redakciaĵoj:

Marica Brletić, Snježana
Habulin, Vida Jerman, Jozo
Marević, Radenko Milošević,
Velimir Piškorec, Josip Pleadin

Presis:

Grafokom, Đurđevac

Aperritmo:

Ĉiun duan monaton (januaro,
marto, majo, julio, septembro
kaj novembro). En 2008 aperos
ses numeroj.

Jarabono por 2008:

en Kroatio: 75,00 kunaĵoj
al ĝirkonto de "Grafokom"
2360000-1100925404
alilande: 15,00 eŭroj
al UEA-konto: plea-k

Perantoj:

UEA, Nieuwe Binnenweg
176, NL-3015 BJ Rotterdam
libroservo@co.uea.org

Orbis Pictus, Via Parini 5
IT-34129 Trieste
orbispictus@iol.it

RESUMO

Frontpaĝe salutas vin ponto, simbolo de homa kunligado. Pri tiu escepta konstruaĵo en Sisak, sian rakonton prezentas nia kunlaborantino, kies avo helpis kosnervi ĝin en milita tempo. En februaro Sisak refondis sian Esperanto-societon en najbareco de la ruĝbrika fonto.

Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj, kvankam negranda organizaĵo, senriproze aktivas. Jarkomence ni proponas al vi elŝuti la pasintjarajn numerojn el la retejo www.gazetejo.org, kie ili troveblas ekde marto. La plej grandan progreson de UZE prezentas la nova retejo www.zagreba-esperantisto.hr, kiu baldaŭ anstataŭos la antaŭan blogon. La nova retejo proponos al vi regulan kontakton kun UZE kaj ĉiam aktualajn novaĵojn en la periodo inter du paperaj numeroj de nia revuo.

Pasintjare ni rememoris pri la plej granda kroata esperantisto, Ivo Lapenna, kiu forpasis antaŭ dudek jaroj. Lige al tiu dato, ni prezentas al vi la kortuŝajn rememorojn de lia vidvino Birthe.

En la enlanda vivo okazis multaj admirindaj progresoj: "Naŝiĉki zbornik" en tre digna stilo prezentas Esperanton kaj esperantistojn, okazis jarkunveno en Split kaj la tradicia partopreno de rijekaj esperantistoj en unu el la atrakciaĵoj de la urbo - Rijeka karnavalo. Grava studo pri la prezidanto de Kroata Esperanto-Ligo kaj membro de Honora Patrona Komitato de UEA, s-ro Dalibor Brozović, estas preparita de Nikola Rašić por memorlibro de la simpozio okazinta en Zadar.

Kelkaj neesperantaj temoj helpas al ni eviti monotonecon de Esperantujo: jen iom pri matematiko, iom pri ŝunumeroj, kaj pri glagolico, la malnova kroata skribo, nesufiĉe konata al alilandanoj.

Historiaj temoj rilatas al interesa franciskana esperantisto Lovro Kiš kaj al societo "Naturamiko", en kies sino kreskis ankaŭ multaj esperantistoj.

Ondante alfluas nin novaj eventoj el Esperantujo, jen agrablaj, jen alispecaj. Ni notas gravajn perdojn de la Movado - forpason de Ada Csiszár, Claude Piron kaj Don Harlow, kiuj estis kolonoj de landaj movadoj hungara, svisa kaj usona, respektive de la internacia. Kun agrabla sento ni mencias belajn atingojn de Esperanto: preparojn por okazigo de ĵurnalista kongreso en Litovio, grandajn preparojn en Bjalistoko, viziton de Osmo Buller al Kubo, informon pri infanlibra projekto financota de Eŭropa Unio ktp.

Ĝuu senlime, kaj ne forgesu dividi kun ni informojn pri gravaj eventoj en viaj medioj.

La redakcio



NE PLU BEBO!

Ekde sia fondiĝo Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (UZE) konstante entreprenas novajn paŝojn. Ĝi ne plu estas bebo, ĝi moviĝas per certaj piedoj! Kunpaŝu kun ĝi!

NOVA RETEJO DE "ZAGREBA ESPERANTISTO"

Tiuj kiuj atente legas la novaĵojn pri "Zagreba Esperantisto" certe fojfoje vizitis ankaŭ ĝian blogon. Sed, jen la plej freŝa novaĵo: "Zagreba Esperantisto" la 30-an de januaro ricevis novan domajnon: www.zagreba-esperantisto.hr. La retejo estas ankoraŭ konstruata, sed baldaŭ ĝi prezentiĝos al niaj legantoj. Ni devas publike kaj plenkore danki al la ĝisnunaj prizorgantoj de nia blogo, s-roj Željko Zurl kaj Mato Špekuljak, kiuj senrezerve volontule okupiĝis pri ĝia redaktado. Pro la familiaj zorgoj, la provizora gvidanto de nia antaŭa blogo, s-ro Mato Špekuljak, retiriĝis el la redakta posteno, kaj la novan retejon redaktos kaj teknike aranĝos profesiulo, Ivica Milovan. Multaj novaĵoj aperos tie en tute nova, alloga aspekto (vidu proversion ĉi-sube).



"ZAGREBA ESPERANTISTO" LIBERE ELŜUTEBLA

Per senrezerva helpo de Boris-Antoine Legault, gvidanto de la retejo www.gazetejo.org, la 2-an de marto en tiu retejo aperis la kvar pasintjaraj numeroj de nia gazeto. Ili estas libere elŝuteblaj kaj legeblaj en pdf-formato. Bonvolu uzi la ofertitan avantaĝon! La enretigo estis jam longe planita, kaj ĝi signifas pluan proksimiĝon ankaŭ al tiuj legantoj, kiuj ne povas ricevi paperan eldonon de nia revuo.

ALĜPETO SENDITA AL KROATA ESPERANTO-LIGO

Rezulte de la unua kunsido de la estraro de UZE, okazinta la 30-an de januaro, prezidanto de UZE Radenko Milošević sendis oficialan peton pri aliĝo de UZE al Kroata Esperanto-Ligo. La dokumento portas la daton 1-a de februaro, kaj UZE atendas pozitivan respondon de KEL post jarkunveno okazonta verŝajne en aprilo.

ABONHELPA FONDUSO KRESKAS

Dank' al pluraj donacoj la "Abonhela Fonduso" lanĉita de "Zagreba Esperantisto", disponigis senpagajn jarabonojn al nepagipovaj esperantistoj en la mondo. Helpis al ni per sendo de adresoj de aktivaj samideanoj: Koffi Doumegnon, sekretario de Afrika Centro Esperantista kaj Gbeglo Koffi el Togolando, s-ro Hori Jasuo, respondeculo pri Azia Komisiono de UEA, dum Martin Schäffer, respondeculo de Amerika Komisiono de UEA, sendis pozitivan opinion kaj petis iom da tempo por elekti la plej meritajn personojn por senpaga abono.

Ĝis nun estas disponigitaj senpagaj abonoj al esperantistoj kaj organizaĵoj en: Ruando (1), Ganao (1), Sudafriko (1), Tanzanio (1), Demokratia Respubliko Kongo (1), Burundio (2), Togolando (2), Niĝerio (1), Bangladeŝo (1), Indonezio (1), Mongolio (1), Nepalo (1), Irano (1), Pakistano (1), Rusio (1), Srilanko (1), Taĝikio (1), Uzbekio (1), Rumanio (1), Bulgario (1), Albanio (1) kaj Kroatio (1).

Daŭre bonvenas monkontribuantoj en la "Abonhelpan Fonduson", kaj proponoj por novaj ricevantoj de senpagaj abonoj. Se vi konas aktivan esperantiston en iu nepagipova aŭ malriĉa lando, kiu ŝatus legi nian gazeton, bonvolu kandidatiĝi tiun por donacabono. La abonoj estos disponigataj laŭ disponebla alfluo de financaj rimedoj.

LIBROSERVO EKfunkcios

En la nova retejo de "Zagreba Esperantisto" baldaŭ aperos ankaŭ Libroservo de UZE, gvidata de "Grafokom" en Đurdevac.

MIA VIVO KUN IVO LAPENNA

Birthe Lapenna

Multaj, multaj jaroj pasis ... Miaj pensoj flugas kaj haltas ĉe unu el la plej gravaj mejloŝtonoj de mia vivo. En la Koncertejo de la fabela "Tivoli" en Kopenhago mi "perdis" mian koron. Tio okazis dum la Inaŭguro de la Universala Kongreso de Esperanto, la 5-an de aŭgusto 1956.

Neniam antaŭe mi ĉeestis Esperanto-kongreson. Mi sidis meze de la 8-a vico aŭ de la 12-a. Absolute neniun sur la podio mi konis kaj ankaŭ ne sciis la nomojn. Kiam unu el la personoj eniris la podion kaj sidigis, mia koro komencis forte bati. La viro estis tiel belega, alloga, ĉarma kaj elradiis karismon ... Li tuj rimarkis min. Poste tiu unika viro iris al la pupitro por fari la Festparoladon. Li daŭre rigardis min, kvazaŭ li parolus nur al mi. Lia voĉo sonis kaj sonoritis kiel klasika muziko, laŭ mi la plej sublima arto. Neniam mi aŭdis tiel belegan voĉon. Mi estis komplete ravita. Poste montrigis, ke ankaŭ li "perdis" sian koron en la sama momento, kiam li rimarkis min. Tiu senfine bela viro estis Ivo Lapenna. Tiel komenciĝis la plej bela ama aventuro kun la plej pura homo - kaj ekstere kaj interne - de la mondo. Ekde tiam ni estis nedisigebla paro ĝis lia forpaso - en miaj brakoj - la 15-an de decembro 1987. Li daŭre estas en miaj pensoj. La plej-plej granda, bela kaj unika amo, kiu iam ekzistis en la tuta historio.

La redaktoro de "Zagreba Esperantisto" petis min skribi artikolon kun la titolo "Mia vivo kun Ivo Lapenna". La temo estas por mi iom malfacila, ĉar mi sentas, ke mi ne povas rakonti pri nia intima vivo. Mi ne deziras ripeti tion, kion mi rakontis en mia artikolo en la verko "Eseoj memore al Ivo Lapenna", 2001, redaktoro Prof. D-ro Carlo Minnaja. Se mi devus skribi pri nia senfine riĉa vivo, mi devus skribi multajn, multajn dikajn verkojn, ĉar neniu havis tiel riĉan, interesan kaj dinamikan vivon kiel Ivo Lapenna kaj mi. - Nu, mi klopodas, tamen, menciigi nur kelkajn aferojn. Mi trovis originalajn kartojn, kiujn mia edzo skribis al iu sinjoro kaj al mi. Jen fragmentoj:

"14.11.1983

Karega mia birdeto (lia karesnomo al mi pro mia nomo "Birthe"), mia sola amego, ...

Havu feliĉegan tagon enpense kun mi, same kiel mi estas enpense kun vi. En mia kazo tio, tamen, ne estas io speciala, nun okaze de via naskiĝtago, ĉar mi ĉiam kaj senĉese estas enpense kun vi! Nun mi plian fojon rememoras vivece pri niaj renkontiĝoj, pri la multegaj belegaj vojaĝoj tra tuta Eŭropo, pri niaj ĉiaspecaj aventuroj, pri nia ...

Kvankam iurilate ne estis tiel, kiel ni ... estus dezirintaj, tamen ni devas danki al la sorto, ke ĝi kunligis nin kaj ke ni havis, havas kaj plu havos la plej dinamisman



El la plej feliĉaj tagoj

amvivan, kiun oni povas imagi nur fantaziante rozkolore. Miloj da viroj envias min, ĉar mi havas vin - la plej belan, erotikan, helpeman, amikan virinon en la tuta mondo. Kaj milionoj da aliaj envias min, se ili sciis nur pri parteto de nia amrilato. Eble ankaŭ iuj virinoj envias vin, se ili sciis kiel senfine mi amegas vin ...!"

La originala teksto skribita al iu doktoro el tiama orienta lando:

"Kara D-ro ...

Certe ĝojigos vin la informo, ke la 28-an de la pasinta monato mi edziĝis en Kopenhago kun S-ino Birthe Zacho, kun kiu mi konatiĝis jam en 1956. Ŝi estas la sola amo de mia vivo, nun kronita per geedziĝo.

Kun tre afablaj salutoj por vi kaj ĉiuj viaj, Ivo Lapenna".

"14.11.1987

Karega mia sola unika amego!

... Kion vi, birdeto, devas kompreni estas, ke mi senfine amegas vin kaj pensas nur pri nia estonteco, pri trankvila kunvivado en Londono kaj Kopenhago, poste bela vojaĝo al Rhodos, pri posta bela vojaĝo al Ateno. Nur pri tio mi pensas ĉiam duope: vi kaj mi ... Post tio ni revenos ... kaj vivos en trankvilo, sereno kaj amo. Ĝuste la amo, kiel vi plurfoje diris, estas la sole grava en la

vivo. *Komprenu tion, birdeto, ke mi ...
Do, ankoraŭfoje gratulon kaj bondezi-
rojn plejvarmajn por via feliĉo, kiu samtempe estas mia
feliĉo! Por eterne en amego Via Ivo*".

Post tiuj ĉi ekzemploj de la ĉiutagaj leteroj, kiujn mi ricevadis, mi rakontos pri epizodoj de nia 31-jara kunestado.

En 1958 mia patrino, Kirsten Zacho, fariĝis redaktoro de la revuo "Esperanto". Ŝi ĉeestis la kunsidojn de la Estraro de UEA en ĝia domo en Roterdamo. Ĝuste tiun domon UEA akiris pere de Ivo Lapenna. Tiujn renkontiĝojn ni ĉiam ĉeestis. Ni pasigis belegan kaj amuzan tempon kun la tiama Estraro kaj precipe kun nia plej intima amiko, Prof. D-ro Giorgio Canuto. Ivo Lapenna estis konata pro sia granda humuro. Absolute belega tempo, plena de rido kaj varma amikecol...

Ivo Lapenna konsideris miajn gepatrojn, Kirsten kaj Peter Zacho, kiel siajn plej bonajn geamikojn. Ni ĉiuj pasigis senfine belajn jarojn kune. Ofte, kiam Ivo Lapenna vizitis ilin, li tre kontente diris "nun mi estas hejme". Dum liaj oftaj vizitoj en Kopenhago miaj gepatroj ĉiam invitis gastojn - eĉ eksterlandanojn. Multajn belegajn festojn ili aranĝis en sia domo en Randbølvej 4, Kopenhago - la sidejo de la fama Eldonejo KOKO, kies gvidanto estis Kirsten Zacho, la Prezidanto de la mondkonata Esperanto-klubo KKK (Korekto de eraro en la libro "Babile kun mi mem" de Poul Thorsen. Mi interparolis kun P.T. pri tiu eraro, kaj li konfesis, ke mi pravas. Miaj gepatroj kaj li kune kun aliaj fondis kaj la klubon KKK kaj poste la Eldonejon KOKO. Poul Thorsen ne estis la gvidanto de KOKO, sed li estis la plej grava kunlaboranto).

Ivo Lapenna kaj mi ĉiam kunlaboris. Li daŭre interkonsiliĝis kun mi pri gravaj aferoj. Ekde 1981 ĝis fine de 1987 ni kunlaboris ankaŭ pri la internacia informata kaj kultura revuo "Horizonto", kies ĉefredaktoro li estis. Mi estis ĝia teknika redaktoro. Kiam mi skribis artikolojn kaj leterojn, mi petis lin korekti la lingvaĵon. Li ĉiam ridetante diris: "Kvazaŭ mi mem estus skribinta la tekston. Vi bone lernis de mi". Kompreneble, ke en tiu tempo mi sciais imiti lian stilon, ĉar ni ja estis en ĉiutaga kontakto kaj skribe kaj buŝe dum 31 jaroj! ...

Ivo Lapenna instruis al mi amason, i.a. klasikan muzikon (kvankam mi alktumigiĝis kaj adoris ĝin ekde la infanaĝo), pentroarton, arkitekturon, skulptoarton, literaturon, lingvojn, historion ktp. Ni vizitis multajn muzeojn en tiuj landoj, kiujn ni daŭre vizitadis, ofte kun mia filo, Pierre. Kutime ni kune vojaĝis/feriis du-tri fojojn jare. Ĉiujare ni estis en Italio. Absolute ĉie ni estis. Ni adoris/as la urbojn Romo, Venecio, Florenco, ja ĉiujn lokojn de la nordo ĝis la sudo, de la okcidento ĝis la oriento. En 1961, laŭ mia memoro, ni renkontiĝis kun nia kara amiko, Carlo Minnaja, kiu akompanis nin al Villa Adriana en Tivoli ekster Romo. Hodiaŭ Prof. D-ro Carlo Minnaja estas tre estimata kaj brila sciencisto en la Universitato de Padova kaj Prezidanto de "Internacia Scienca Instituto Ivo Lapenna".

Ivo Lapenna estis sendube unu el la plej noblaj kaj sinceraj homoj de la mondo. Li estis

ekstreme sincera. Ekzemple, neniam li venis al la ideo reuzi nestampitan poŝtmarkon, eĉ se li devus pagi punon, ĉar mankis al li poŝtmarko. Li ankaŭ ne uzis la telefonon en sia universitata ĉambro por privataj konversacioj, sed anstataŭe iris al la poŝtoŭicejo, ĉar li "ne volis trompi la ŝtaton".

Malgraŭ la monda pozicio en la sciencaj medioj Ivo Lapenna rilatis al ĉiuj homoj egale kaj tre amike. Mi donas nur du ekzemplojn. La unua estas, kiam okazis la ribeloj en 1968 ĉie en la mondo. Lia Universitato, la mondfama kaj prestiĝa "The London School of Economics and Political Science", la Universitato de Londono, estis komplete blokita de studentoj. Neniu profesoro rajtis eniri la Universitaton. La studentoj tre dense kuŝis sur la grandega ŝtuparo de la ĉefenirejo. Ivo Lapenna estis la sola profesoro, kiu ili lasis pasi por eniri la Universitaton, ĉar "Ivo Lapenna estis la plej ŝatata profesoro en la Universitato, ĉiuj adoris lin", diris la profesoroj al mi dum la funebra ceremonio. Pri tiu ĉi epizodo Ivo Lapenna siatempe mem rakontis.

La dua ekzemplo estas, ke fine de oktobro 1987, kiam Ivo Lapenna deziris translokigi kelkajn pezajn kestojn kun libroj de sia universitata ĉambrego al la biblioteko de la Universitato - kutime li ĉiam ordigis tiajn aferojn mem - li vokis la pordiston de la universitato por demandi, ĉu li estus tiel afabla helpi lin. Li kaj ankaŭ la alia pordisto, ambaŭ afrikanoj, tuj venis. La unua demandis, kun larmon en siaj okuloj, "ĉu vi permesas, ke mi premu al vi la manon, Prof. Lapenna?". Iom konfuzita mia edzo respondis, "jes, volonte". La pordisto daŭrigis: "Vi estas vera 'gentleman' kaj la sola profesoro en la Universitato, kiu ni ŝatas. La aliaj profesoroj estas tre arogantaj kaj ne salutas nin. Vi ĉiam estas tre afabla kaj parolas kun ĉiuj." Tuj poste la alia pordisto - ankaŭ li havis larmon en siaj okuloj - demandis: "Ĉu ankaŭ mi rajtas, Profesoro?" Mia edzo estis tiel kortuŝita, ke tuj post tiu evento li vokis min, kiu estis en Kopenhago, por rakonti pri la bela kaj kortuŝa travivaĵo. Kompreneble, ke ankaŭ mi kortuŝiĝis. - Ni ne plu interparolis aŭ pensis pri tiu ĉi epizodo.

Pere de Ivo Lapenna mi ekkonis amason da interesaj kaj signifoplenaj personoj. Iam ni estis privataj gastoj de la Prezidento de Aŭstrio, D-ro Frans Jonas, kaj dum ok tagoj privataj gastoj ankaŭ de la ĉefurbestro de Mainz, D-ro Franz Stein. Estis komence de januaro kaj multe da neĝo sur la stratoj, kiam okazis la granda, tradicia urba karnavalo. Ivo Lapenna kaj mi staris sur la balkono de la urba teatro kune kun la urbestro kaj lia edzino por mansvingi al la karnavala prezentado de rajdantaj viroj, kiel salutis la urbestron/nin. Vespere ni estis invititaj kiel honoraj gastoj al grandega festo en la kastelo. Ĉiuj plej gravaj personecoj de Germanio kaj aliaj landoj, ekz. la direktoro de Opel, konataj geaktorj ktp., estis invititaj partopreni la belegan feston.


Ofte Ivo Lapenna estis invitita prelegi pri juro en diversaj landoj, sed ankaŭ pri la Internacia Lingvo, kaj kelkfoje mi akompanis lin. Iam li devis sekvi gravan procezon en Moskvo. Li reprezentis

daŭrigo ➔ paĝo 42

➔ daŭrigo el la paĝo 41

Brition pere de sia Universitato. Samtempe – laŭ peto de la esperantistoj en Moskvo – li prelegis en la Esperanto-klubo tie. Al tiu vojaĝo mi ne akompanis lin, mi iris nur al la ŝipo, kiu foriris de Kopenhago. Alian fojon Ivo Lapenna estis invitita prelegi dum Wittgenstein-simpozio en Kirschberg. Ĉeestis ankaŭ Prof. D-ro Helmar Frank - kaj mi. Estas maleble menciigi ĉiujn urbojn de la mondo, kie Ivo Lapenna faris paroladojn kaj preleĝojn, ĉar ili estas sennombraj.

Kiel oni ja scias, Ivo Lapenna estas mondfama. En lia Universitato, kie li instruis kaj science laboris ĝis oktobro 1987, do, preskaŭ ĝis la forpaso, la profesoroj/ eminentuloj de tempo al tempo estis invititaj al la Reĝino de Britio. Ankaŭ la Universitato mem okazigis grandajn bankedojn por la prestiĝaj profesoroj. Antaŭ nelonge, en mia librobretaro, mi trovis belan inviton de 1986 al tia bankedo. Komprenibile, ke la nomo Ivo Lapenna troviĝis inter la invititoj.



En Londono la filo de la fama verkisto kaj politikisto Milovan Dilas, Aleksa Dilas, kontaktis Ivo Lapenna por demandi, ĉu li estus preta verki artikolon por nova libro "Demokratische Reforme – Democratic Reforms in Jugoslavia – Introduction and Summaries in English". Aleksa Dilas tiel estimis Ivo Lapenna, ke li nepre deziris, ke lia artikolo estu la unua – antaŭ tiu de Milovan Dilas, lia patro. La gravega libro, kiu estis bone akceptita, aperis en Londono 1982.

En januaro 1988, post la forpaso de Ivo Lapenna la 15-an de decembro 1987 en Kopenhago,

mi estis invitita de lia Universitato al belega funebra ceremonio, organizita de la Universitato mem honore al li. Ĉeestis la profesoroj, studentoj kaj oficistaro en la granda salono, "The Founders Room", kiu estis plenshopita. Mi devis sidi sur apogseĝo tuj antaŭ la pupitro. La Rektoro kaj tri konataj profesoroj, inter ili mia amiko, Prof. D-ro John Wells, iama Prezidanto de UEA, belege parolis. Ĉiuj parolis pri la eminenta scienca laboro, kiun Ivo Lapenna faris por la homaro, kaj parolis ankaŭ pri lia enorma laboro por la Internacia Lingvo, Esperanto. John Wells emfazis, ke "Ivo Lapenna estas la arkitekto kaj la kreinto de la moderna Esperanto-Movado". Ili bele kaj laŭde parolis pri liaj unika personeco, karismo kaj ĉiama afableco. Ili diris, ke la studentoj adoris lin, kaj la profesoroj ne nur treege estimis, sed ankaŭ multe ŝatis lin. - Konata muzikisto belege ludis violonĉelon (I.L. ja mem ludis violonĉelon). Post tiu ĉi vere impona ceremonio, la Universitato invitis al bela akcepto en "La Biblioteko". Ĉie estis amaso da homoj. Mi interparolis kun la diversaj profesoroj, studentoj kaj sekretarioj. Subite la pordistoj venis al mi, kaj, imagu, kun larmoj en la okuloj ili rakontis absolute la samon, kion ili diris al Ivo Lapenna en oktobro. Nekredeble! "Prof. Lapenna terure mankas al ni", ili diris. Mi mem devis lukti por ne plori. ... Mi konstatis, kiel senfine la ĉeestantoj admiris kaj ŝatis Ivo Lapenna. ... Mi ankaŭ konstatis, kiam mi interparolis kun la du sekretariinoj de mia edzo, ke ne plaĉis al almenaŭ kelkaj profesoroj, ke la edzino de Prof. D-ro Ivo Lapenna amike interparolas kun ili.

Kiam mi butikumis en nia regiono de Londono post la forpaso de mia edzo, la vendistoj en diversaj butikoj demandis min: "Kie estas via edzo, la granda 'gentleman'? Li ĉiam estas tiel afabla". Ili fariĝis tre malĝojaj post la sciigo pri lia forpaso.

Ivo Lapenna estis unu el la plej elstaraj homoj de la mondo. Karakterizaj estis liaj unikaj kulturo, etiko kaj eleganteco. Li estis ne nur eminenta, sed samtempe ankaŭ senfine grandanima kaj varma homo. Li mankas al mi, kaj mia koro daŭre ploras pro senfina sopiro al mia sola amo ...

ESPERANTO-DOMO EN SANICA (Bosnio kaj Hercegovino)

La domo funkciis de 1973 ĝis 1995, kiam ĝi estis detruita dummilite.

Tiu, kiu volas helpi ĝian rekonstruon, bonvolu skribi al:

Dragutin Smolić
Karlstr. 9

DE-33098 Paderborn
Germanio

Telefono: 00495251 4148745

Poŝtelefono: 01739012124

Retadreso: smolicsanica@web.de



BULLER ESPLORIS EN KUBO


La ĝenerala direktoro de UEA Osmo Buller de la 2-a ĝis la 9-a de februaro vizitis Kubon invitita de Kuba Esperanto-Asocio, por esplori la kondiĉojn por okazigi la Universalan Kongreson de Esperanto en Havano en 2010. La urbaj kaj turismaj aŭtoritatoj, subtenitaj de la ŝtataj institucioj, invitis la UK-on jam por la dua fojo al Kubo. Dum la vizito Buller estis akceptita interalie de Fernando Rojas, vicministro pri kulturo, Conrado Martínez, prezidanto de la Kuba Kongresa Buroo kaj antaŭe urbestro de Havano. Li renkontis funkciulojn de la Minsiterio pri Turismo, Kuba Libroinstituto, Fremdlingva Eldonejo José Martí, la nacia flugkompano Cubana kaj Radio Havano. Li esploris ankaŭ la kongresejon, la saman en kiu okazis ankaŭ la UK en 1990. Ĝi estas komplete renovigita, kaj estas alkonstruita hotelo, kio pligrandigis la salonajn kapacitojn. Radikale evoluis ankaŭ turismo, kaj multobligis kvanto de restoracioj. Buller estis akompanita de estraranoj de Kuba Esperanto-Asocio. Interesa renkontiĝo estis ankaŭ kun la ambasadoro de Egiptio, Abdel Fattah Ezzeldin, kiu mem lernis Esperanton en 1982 en Budapeŝto. En la vespermanĝo organizita de la ambasadoro, Buller renkontis ankaŭ aliajn personojn el diplomatia vivo, ambasadorojn de Jamajko, Kamboĝo kaj Pollando, honoran konsulon de Finnlando, direktoron de la oficejo de Unesko por la Kariba regiono, prezidantinon kaj aliajn funkciulojn de la Nacia Unesko-Komisiono de Kubo. La 7-an de februaro en la teatro de la Nacia Biblioteko José Martí okazis simpozio pri la 100-jariĝo de UEA (vidu apudajn fotojn), en kiu festparolanto estis la ĝenerala direktoro Buller. Verve parolis ankaŭ la ambasadoro Abdel Fattah Ezzeldin kaj aro da konataj kubaj esperantistoj.



Ĝenerala direktoro de UEA festparolanta en la simpozio en Kubo (supre) kaj sidanta kune kun la egiptia ambasadoro Abdel Fattah Ezzeldin (malsupre).



Retpaĝo de Kuba Esperanto-Asocio



UEA ATINGIS 6000 INDIVIDUAJN MEMBROJN

La statistikoj pri UEA-membraro iomete zorgigas. Kvankam UEA ankaŭ en 2007 sukcesis superi la limon de 6000 individuaj membroj, kion anoncis en la diskutejo de la komitato de UEA la estrarano Ranieri Clerici, la grafikono klare montras, ke UEA membronombro estas nestabila. Dum la jaroj 2003-2005 la membronombro evoluis pozitive, sed dum la lastaj du jaroj denove rimarkeblas (kvankam negranda) malkresko. Komprante la jarojn 2005, 2006 kaj 2007, malgranda malkresko estas rimarkebla: en 2005 estis 6107, en 2006 - 6066 membroj kaj en 2007 apenau 6000. Laŭ Ranieri Clerici nur malfruaj aliĝintoj savis la statistikon de 2007.

SERBA ESPERANTO-KONGRESO

Fidindajn informojn pri la 1-a kongreso de serbiaj esperantistoj, pri kiu cirkulis onidiroj, ni ricevis apenaŭ meze de februaro. Ĝi okazos inter la 1-a kaj 4-a de majo 2008 en Niška Banja. Dum la unua kongrestago okazos oficiala malfermo kun kulturamuzo programo, labora parto, teatra prezentado, ekspozicio kaj amuzvespero. La labora parto estas planata ankaŭ por la dua kongrestago, post kio akceptos la partoprenantojn ankaŭ la urbestro de Niŝ, kaj posttagmeze sekvos kulturamuzo programo kaj komuna vespero. La tria tago estas dediĉita al kongresa ekskurso, dum kiu la kongresanoj vizitos la monumenton

en Ĉegar kaj la monaĥejojn Lipovac, komune tagmanĝos en la naturo kaj vespere revenos al la hotelo "Ozren" en Niška Banja, kie ili loĝos dum la kongreso. Ankaŭ la kvaran tago okazos labora parto, disdono de diplomoj kaj atestiloj, kaj fine fermo de la kongreso.

Prezidanto de la organiza komitato de la unua kongreso de najbarŝtataj esperantistoj estas Momĉilo Krstić kaj detalajn informojn petu de Zvonimir Nikolić (zvoniart@medianis.net), Toplička 4, 18000 Niš, Serbio. Aliĝkotizo por plenkreskuloj estas inter 30 kaj 40 eŭroj, kaj loĝado en dultitaj ĉambroj ĉ. 18,00 eŭrojn potage kaj popopone (inkluzivita matenmanĝo kaj tagmanĝo).

GRATULINDA EKZEMPLO DE "NAŠIČKI ZBORNIK"


 Josip Pleadin

Neofte aperas nacilingvaj libroj kiuj traktas Esperanton en tre pozitiva senco kaj science alta nivelo. "Našički zbornik 8" (Almanako de Našice, n-ro 8), aperinta komence de 2008 estas ĝuste tia eldonaĵo. Eldonita de Filio de Matica hrvatska en Našice, tiu slavonia urbo konata kiel naskiĝloko de pioniro de Esperanto en Kroatio Mavro Špiccer (kiu eĉ havas lianoman straton ekde 2005), kaj redaktita de Silvija Lučevnjak, tiu ĉi 430-paĝa volumo mencias Esperanton en tre digna maniero, mi kuraĝus diri, kiel altvaloran socian kaj kulturan fenomenon, pri kiu okupiĝis elstaraj homoj ankaŭ en Našice.

La oka volumo de "Našički zbornik" apartan lokon dediĉis al studo de d-ro Velimir Piškorec titolita "Iz života i djela Mavra Špicera (1862.-1936)." (El la vivo kaj verkaro de Mavro Špiccer (1862-1936)", pri kiu la redaktorino Silvija Lučevnjak skribas en la enkonduko de la volumo jene: "Per sia detaleco elstaras la studo de d-ro sci. Velimir Piškorec (Fako pri germanistiko de Filozofia fakultato en Zagrebo) pri Mavro Špiccer, grava nomo de kroata kulturo, aparte de la Esperanta movado". Kaj jes, tiu teksto estas tre detala, ampleksanta eĉ 66 paĝojn (145-210)! El historia vidpunkto ĝi estas la plej detala prezento de tiu neglektita socia, kultura kaj esperantista aktivulo iam ajn verkita. La teksto estas riĉe ilustrita, kaj prezentas la personecon de Špiccer el pluraj vidpunktoj: li ja estis purlingvulo, kiu uzis kelkajn lingvojn egalnivele, en tempo kiam tio ja ne estis kutimo. Li estis verkisto en la hungara, germana, kroata kaj Esperanto. Lia vivo estis

multfaceta kaj tre riĉa, kaj la studo de d-ro Piškorec prezentas ĉiun faceton aparte, kun senco de bona sciencisto. Ĉe la fino de la artikolo troviĝas impona (3-paĝa) listo de uzita literaturo kaj resumoj en la germana kaj Esperanto. Kvankam resumajo de la studo pri Mavro Špiccer aperis en "Tempo", la kompleta materialo certe meritus aperi ankaŭ en Esperanto kiel aparta libro.

Alia



Esperanta temo en la almanako estas la teksto "Franjevac o. Lovro Kiš" ("Franciskano Lovro Kiš") el la plumo de Mato Batorović (paĝoj 211-219). La tekstaŭtoro estas Mato Batorović, pensiita kustoso kaj direktoro de Urba muzeo en Ilok, tiu ekstreme orienta urbeto de Kroatio, situanta ĉe kroata-serba landlimo. Mato Batorović estas la ĉefa biografo de franciskano Lovro

Kiš, kiu dum du jardekoj vivis en la franciskana monaĥejo en Ilok. Liajn tekstojn kaj konstatojn mi uzis por mia esploro pri Lovro Kiš, preskaŭ nekonata kroata esperantisto, pri kiu nur mallonga informo troviĝis en mia "Biografia leksikono de kroataj esperantistoj" (2002). Legado de la teksto en "Našički zbornik" memorigis min pri tiu teksto sendita al la redakcio de "Tempo" ankoraŭ en decembro 2006 sed neniam publikigita. Mi eliris ĝin el la arkivo kaj jen proponas al vi ekscii pli detale pri la franciskana samideano vivinta izolite en la monaĥejo de Ilok.

Sed, per tio ne finiĝas mencioj de Esperanto en "Našički zbornik". En la teksto "Pregled zavičajnih tekstova, autora i izdavaštva našičkog kraja" ("Trarigardo de hejmgregionaj tekstoj, aŭtoroj kaj eldonado de la regiono de Našice"), verkita de la redaktorino mem, sur la paĝoj 42-43 estas menciita ankoraŭ unu grandulo de Esperanto-Movado en Kroatio. Temas pri doktoro Gabrijel Divjanović, estinta direktoro de Zagreba observatorio kaj redaktoro de Esperantlingva gazeto pri astronomio "Homo kaj Kosmo". Li, nome, naskiĝis ankaŭ en Našice en 1913. La aŭtorino mencias lian gravan kontribuon al Esperanto.

Kvankam mi ne tralegis detale la 430-paĝan volumon, mi sukcesis rimarki ankoraŭ unu mencion de Esperanto. En la biografio de verkisto Stjepan Tomaš, ni povas legi: "Liaj prozaĵoj estis tradukitaj en la germanan, italan, slovakon, hungaran, slovenan kaj Esperanton." Tio memorigis min, ke ĝuste mi tradukis lian rakonton "Noĉni posao", kiu sub la titolo "Nokta laboro" aperis en la antologio "Barkoj el akvo", eldonita de IKS en Zagrebo en 1998.

Atenta leganto eble trovos ankoraŭ iun ligan al Esperanto en la ampleksa kaj prestiĝa almanako. Ĉiukaze, temas pri gratulinda, bone planita kaj realigita publika prezento de Esperanto kiel kultura faktoro.





Srećko Radulović

SISAK, la 27-an de februaro 2008. - En Sisak okazis renoviga kunveno de Asocio por Esperanto Sisak, kiu estis fondita en 1978 (registrata en 1984), kaj kies iniciatinto kaj la unua prezidanto estis Srećko Radulović. Dum la Patrolanda milito Sisak troviĝis en la unua defendlinio de Kroatio, kaj ĝi estis ofte bombardita, pro kio la Esperantaj aktivecoj ĉesis. Iniciatoj por renovigo de la societo komenciĝis en 2005, kiam Srećko (patro) kaj Ivan (filo) Radulović aliĝis al Kroata Fervojista Esperanto-Asocio en Zagrebo, kaj tie frekventis kurson, gviditan de Roža Brletić-Višnić. En julio 2006 la fervojistoj organizis ekskurson al Sisak por 18 siaj membroj, kaj en februaro 2007 fondiĝis iniciata komitato konsistanta el Srećko Radulović, Dovani Furlan kaj Ivan Radulović. Helpe de Kroata Esperanto-Ligo, la Iniciata komitato organizis la 22-an de marto 2007 en gimnazio de Sisak prelegon "Per Esperanto



ESPERANTO-SOCIETO (RE)FONDITA EN SISAK

vi povas iri ĝis la mondfino". Prelegis Spomenka Štivec, kaj al la posta Esperanto-kurso aliĝis 6 ĉeestintoj. Journalisto de loka gazeto Josip Ožanić pri la prelego verkis tutpaĝan artikolon. La kurso okazadis ekde aprilo 2007 en la ejo de Junulara klubo SKWHAT, kaj gvidis la kurson Srećko Radulović.

Sekvi pluraj partoprenoj de la Iniciata komitato en aktivecon de Kroata Esperanto-Ligo kaj Esperanto-societo "Bude Borjan" en Zagrebo, kio kulminis per bela koncerto ĉe la rivero Kupa en Sisak, organizita de Oficejo por sociaj aktivecoj de la urbo Sisak, kaj prezentita de la rusa kanzonisto Mikaelo Bronštejn kaj pola gitaristino Hanna Orlewicz, kaj fine ankaŭ per (re)fondo de Esperanto-societo, kiu okazis la 27-an de februaro 2008. Por prezidanto estis elektita Srećko Radulović, vicprezidanto fariĝis Ivica Buturac

kaj membroj de la prezidantaro Dovani Furlan, Dunja Jurić, Ivan Radulović, Ivica Sklizović kaj Ana Valentić. Estis akceptita la societa statuto kaj komenciĝis procedo por jura registriĝo. Jarkotizo por 2008 estos 55,00 kunaĵoj. Pro kvalita informado pri Esperanto, al la journalisto Josip Ožanić estis donacita libro "Esperantski mozaik" de Davor Klobučar. La fondkunvenon partoprenis kaj salutis reprezentantoj de Kroata Esperanto-Ligo (Spomenka Štivec), Kroata Esperanto Junulara Asocio kaj Kroata Fervojista Esperanto-Asocio (Sanja Damjanić), Esperanto-societo "Monda paco" el Velika Gorica (Stjepan Žarina), Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj (Josip Pleadin), Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto (Judita Rey Hudeček), Blindulasocio de urbo Sisak (Ilija Pavić) kaj Amikoj de Bruno Gröning (Stjepan Sertić).



KIA ESTAS VIA ŜUO-NUMERO?

 Aleksije Herić

Ĉiu normala homo konas la numeron de siaj ŝuoj, sed ofte ne konas la realan signifon de tiu numero. Por numerigado de ŝuoj, almenaŭ en Eŭropo, oni uzas tri sistemojn.

Bazo por la numerigado de ŝuoj estas la longeco de la piedo, sed oni neniam uzas puran longecon de la piedo, ĉar la ungo de la dikfingro aŭ de alia plej longa piedfingro ne rajtas tuŝi la internan parton de la ŝuo dum la paŝado. Tial necesas aldoni al pura longeco (*pl*) t.n. pintan aldonon (*pa*) kaj la rezulto estas la longeco de la modelilo (*l*) laŭ kiu oni faras piedŝuojn, respektive **tio prezentas la numeron de la ŝuo**.

Pinta aldono (*pa*) valoras 5-25 mm kaj ĝi dependas de la formo de la modelilo. Eĉ la plej larĝa modelilo, je fingra parto, postulas minimume 5 mm de la pieda aldono.

Grava fakto en la tuta afero estas tio, ke oni ne povas reale al si mem mezuri la piedon, ĉar dum mezurado ambaŭ piedplandoj devas esti samŝarĝitaj je kompleta surfaco.

Sistemoj por numerigado

A. Se *l* estas 1 cm (lastatempe oftaj ŝufarantoj uzas ĝin), la longeco de la modelilo esprimita centimetre ankaŭ estas numero de la ŝuo. Tiu ĉi sistemo

ampleksas numerojn (en seria produktado) de 12 ĝis 32 inkluzive duonnumerojn. Ekzemple $l = 28$ cm kaj estas numero 28.

B. Ofte uzata sistemo estas tiu, kies unuo validas $2/3$ da centrimetro, respektive 6,66 mm. Ni nomu ĝin "piko" (*p*) $lp = 2/3$ cm. La mezurskalo samaspektas al metra skalo, sed la diferenco estas je unuoj. Anstataŭ cm esta "pikoj" (*p*). La sistemo ampleksas numerojn de 18 ĝis 48. Ekzemple numero 42 = 28 cm, $42p \times 2/3 = 28$ cm. Ĝenerale oni ne uzas duonnumerojn (diferenco = 3,3 mm).

C. El faka vidpunkto (ekonomio, moda elekto, piedsanstato, k.a.) la tria mezursistemo estas la plej konvena, sed por nefakuloj ĝi estas la plej komplika. Tamen multaj ŝufabrikoj en Eŭropo uzas ĝin. Unuo en ĉi tiu sistemo estas $1/3$ de colo, respektive 25,38 : 3 = 8,46 mm. Ni nomu ĝin "colpiko" (*cp*) $1 cp = 8,46$ mm. Komplikaĵo en ĉi sistemo venas el konsisto de mezurskalo. Ĝi konsistas el tri malsamaj sinsekvaj partoj:

C/1 Unua tute ne indikita parto, longa je 4 coloj aŭ 12 cp (4x3). Tiom proksimume longa estas piedeto de naskito.

C/2 Dua parto de mezurskalo estas indikata de 1 ĝis 13. Por difini la longecon ĝis iu ajn numero el tiu ĉi grupo, oni devas aldoni 12 cp (ne indikata parto). Rezulton oni





SAYONARA, JAPANIO!

Kiel promesite en la 4-a pasintjara numero, en februaro aperis libreto da vojaĝimpresoj titolita "Sayonara, Japanio!", verkita de Davor Klobučar. Ĉiuj abonintoj de nia revuo, kies abono estis registrita antaŭ la 31-a decembro 2007, ricevis dum februaro la libreton donace. La aliaj, kiuj volkas havi la libreton en sia kolekto, bonvolu mendi ĝin ĉe la redakcio. Ĝia prezo estas 28,75 kn (25,00 kn + 3,75 kn poŝtkostoj).

multiplikas per 8,46 por esprimi la longecon centimetre. Ekzemple, numero 8 = 17 cm ($8 + 12 \times 8,46$). Per numeroj el la dua grupo oni indikas nur infanŝuojn.

C/3 Tria parto de mezurskalo pluiras tuj post la lasta numero de la dua parto. Do, post la numero 13 anstataŭ 14 estas denove numero 1 kaj la numerado iras ĝis 46, sed oni uzas nur la unuajn 13. Ĉiujn tiujn numerojn oni devas signi per frakcia linio kaj signo de grupo, samkiel la numerojn de la dua grupo.

Ekzemploj: numero $8/I = 20$ cm = 17 cm ($8 + 12 = 20 \times 8,46 = 169$). Numero $8/II = 33$ cp = 28 cm ($12 + 13 + 8 = 33 \times 8,46 = 279$).



PRI LA PROGRAMOJ DE "BUDE BORJAN"

Esperanto-societo "Bude Borjan" en Zagrebo (Kneza Mislava 11/III) dum februaro realigis kelkajn programojn, kio estas jam tradicio en la nomita societo. La 6-an de februaro omaĝe al forpaso de Claude Piron parolis Spomenka Ŝtimec, kaj semajnon poste, la 13-an de februaro, Višnja Branković prezentis la planitan karavanon de kroatiaj esperantistoj al la roterdama UK. Renkonte al Internacia Kongreso de Blindaj Esperantistoj okazonta en Premantura ĉi-jare, gastis Diana Zerec-Virkes, parolante la 20-an de februaro pri la temo "Koni kaj partopreni en la mondo de blinduloj". La 21-an de februaro multlingvan programon honore al la lingvojaroj kaj la tago de la

gepatra lingvo, gvidis Spomenka Ŝtimec en Biblioteko kaj legejo en Velika Gorica. Boris Ĉović la 27-an de februaro prezentis la temon "Etimologia analizo de la unua leciono el la lernolibro de Zagreba Metodo". Kurson por komencantoj ĉiumerkrede je la 18h00 gvidas Vera Roknić kaj konversacian kurseton samhore kaj samtage Spomenka Ŝtimec.

RAŠIĆ KUNLABORIS PRI ROMAA LINGVO

En la naŭa volumo de Kroata Enciklopedio aperis ankaŭ kontribuajo de Nikola Rašić pri la romaa (cigana) lingvo, kiu anstataŭis la malnovan, jam malaktualigintan artikolon pri tiu lingvo. La romaa estas lingvo eble eĉ pli internacia ol Esperanto, en pli ol centa landoj troviĝas

ĝiaj parolantoj kaj ili ĉiuj estas dulingvaj kaj plurlingvaj, samkiel la esperantistoj. Momente Rašić okupiĝas pri kompilado de manlibro kaj vortaro pri unu el la dialektoj parolataj en Zagrebo kaj aliloke en Kroatio kaj Bosnio.

GEEDZOJ SELEŠ GVIDAS ESPERANTO-KURSOJN

En Elementa lernejo "Franjo Viktor Ŝignjar" en Virje, sian unuan kurson, kiu okazas en tiu lernejo post 42 jaroj, gvidas instruistino Ivanka Seleš por 5 lernantoj.

En Gimnazio "D-ro Ivan Kranjčev" en Đurđevac, post kelkajara paŭzo, denove okazas Esperanto-kurso por 8 lernantoj, gvidata de profesoro Zdravko Seleš, kiu en la lokaj mezlernejoj gvidis kursojn dum 6-7 lernojaroj.

Okaze de

100 jaroj de Universala Esperanto-Asocio

100 jaroj de Kroata Esperanto-Ligo

100 jaroj de Esperanto-Societo Rijeka

50 jaroj de Studenta Esperanto-Klubo el Zagrebo

Esperanta firmao "Orbis Pictus"* *el Triesto, Italio* *10 - jara

elkore gratulas al la jubileantoj kaj

INVITAS

al

**speciala - internacia - solena - festa
kongresa karavano**

Zagrebo - Roterdamo - Zagrebo

18-27.07.2008. aŭtobuse

al 93-a Universala Kongreso en Roterdamo, Nederlando
kaj al ties Internacia Infana Kongreseto

Bonvenu al la plej solena kaj gaja kongresa karavano!

ORBIS PICTUS de Višnja Branković, Via Parini 5, IT-34 Trieste, Italio
Poŝtelefono en Kroatio: +385 / 99 50 11 912 - telefono/faksilo: +39/040 767 875
orbispictus@iol.it

- Kompletaj kaj flekseblaj oferto de vojaĝo, loĝado kaj ekskursoj
- Alternativaj loĝeblecoj, fiksjaj kaj fakultativaj ekskursoj
- Kvalitaj servoj kontraŭ bonaj prezoj!
- Eblas ankaŭ survoja eniro kaj nur unudirekta vojaĝo taŭga ankaŭ por partoprenantoj de antaŭkaj post-kongresaj aranĝoj ekz: OSIEK-konferenco en Slovenio, LIBE-kongreso en Kroatio, IJK - en Hungario, MIRO en Kroatio



NEKONATA FRANCISKANA ESPERANTISTO LOVRO KIŠ

Josip Pleadin

Li naskiĝis la 24-an de aŭgusto 1896 en slavonia vilaĝo Feričanci (apud Našice, la naskiĝurbo de Mavro Špicer, pioniro de Esperanto en Kroatio), kiel deka (la plej juna) infano en la familio de Ivan kaj Jelisava (naskita Tot). Ĉe la baptito li ricevis la nomon Lujo, kaj li mem poste subskribis sin per Ljudevit. Liaj gepatroj almigris Slavonion el hungara urbeto Bikel (en regiono de Baranio) en la jaro 1891. Popollernejoj li finis en Feričanci (en 1908), kaj en 1909 iris al la franciskana seminario en Varaždín, kie li frekventis la ŝtatan gimnazion kaj abiturientigis en Zagrebo dum la unua mondmilito. En 1913 en la franciskana monaĥejo en Trsat (apud Rijeka) li ricevis la franciskan veston kaj fariĝis monaĥa novico. Post unujara noviceco li faris la monaĥan voton. Teologian studon li finis en Zagrebo, kaj pastrigis la 20-an de marto 1921. Kiel pastro li aktivis en katolikaj medioj en Cernik (dum tri monatoj), post kio li estis sekretario de provincialo en Zagrebo. Poste dum 18 (malfacilaj, postkriaj kaj postmilitaj) jaroj li estis ekonomo de la provinco. Ekster Zagrebo li restadis en Bjelovar dum unu jaro, samtiom en Našice, ses monatojn

en Slavenska Požega, tri jarojn en Subotica, 8 jarojn (1949-1957) en Osijek (kiel prizorganto de parokoj de Darda kaj Bilje en kroatia Baranio, kie li predikis en la lingvoj kroata kaj hungara) kaj 10 jarojn en Karlovac. Ekde 1968, ĝis sia morto, dum du jardekoj li vivis en franciskana monaĥejo en Ilok, ĉe la plej orienta ŝtatlimo de Kroatio. Li estis ankaŭ edukisto de novicoj en la franciskana monaĥejo en Trsat.

Dum sia tua vivo li estis malfortkorpa, malsanema, kaj en siaj memornotoj li ofte menciis, ke li tre suferis pro la fortega suninfluo, pro kio li plej ofte ne partoprenis la Esperantajn katolikajn aranĝojn al kiuj li estis jam aliĝinta.

Li estis kunlaboranto de pluraj katolikaj periodaĵoj, interalie de nacilingvaj "Betanija", redaktoro de "Anđeo čuvar" kaj "Glasnik sv. Franje", kaj kunlaboranto de la Esperantlingvaj "Espero Katolika" kaj "Heroldo de Esperanto".

Li mortis en aĝo de 92 jaroj la 17-an de septembro 1988 kaj estis enterigita en la iloka tombejo la 18-an. Li estis unu el la plej malnovaj membroj de Kroata franciskana provinco de sanktaj Kirilo kaj Metodo. La sanktan meson celebris la episkopo Ĉiril Kos kun 20 kuncelebrantaj pastroj.

Dum sia vivo li estis sendube la plej bona konanto de ekleziaj reguloj kaj liturgio. Kiel esperantisto li estis forte kredanta pri utileco de Esperanto, malgraŭ oftaj mokoj de liaj kolegoj. Li lernis Esperanton en la tempo, kiam ĝi komencis aperadi en niaj regionoj, tial ne mirigas, ke inter liaj postlasaĵoj, en lia foto-albumo, kiel la unua foto troviĝas la konata foto de Mavro Špicer en la oficira uniformo de la aŭstri-hungara imperio. Lovro Kiš lernis la

lingvon inter multegaj monaĥaj laboron. Kvankam inter la landa esperantistaro li estas relative nekonata, li tamen estis talenta kaj bona lingvokonanto. Li estis membro de IKUE, en la periodo antaŭ 1974 ankaŭ ĝia estrarano. El Romo al li estis sendita teksto de Esperanta meslibro por korektoj kaj priobservo. Li estis ankaŭ membro de komisiono por tradukado de eŭkariastiaj preĝoj kaj liturgiaj tekstoj. Kiel kunlaboranto de "Espero Katolika" li aperis en la tempo kiam li estis estrarano de IKUE (en la 1970-aj jaroj). Tiam en ĝi estis publikigitaj kelkaj liaj tekstoj, el kiuj menciindas prireligia diskuto kun Josef Kohen-Cedek (KE 4/1975), kaj "Nia sinteno al la aŭtoritatoj" (aperinta en 1972).

Li estis poligloto, konanto de la helena kaj speciale de la mezepoka latina el kiu li tradukis kroatan "Statuton de urbo Ilok" el la jaro 1525 (Vinkovci, 1970) kaj "Miraklojn de frato Johano Kapistrano" (Zagrebo, 1986). Li bone parolis la hungaran, germanan kaj kroatan, kaj uzis ankaŭ la italan kaj francan.

Dum longa tempo li estis la sola kaj plej bona konanto de Esperanto en la Provinco, sed ĉar li intense propagandis ĝin, ankaŭ pluraj aliaj franciskanoj komencis lerni ĝin, iuj eĉ ĝis tiu grado, ke ili diskutis pri lingvistikaj kaj ekleziaj temoj kun Lovro en Esperanto, kaj korespondis kun li. Ni menciis nur du nomojn: Gracijan Biršić (kiu lernis Esperanton kun sia patro Petar Biršić laŭ koresponda kurso de Nikola Lisac, poste laŭ konata lernolibro de Dušan Maruzzi, kies frato Elekt Maruzzi estis ankaŭ franciskano) kaj Rikard Patafta (nuntempe paroĥestro en la slavonia vilaĝo Đurđenovac), kiu lernis Esperanton dum sia

soldatservo, sed kiu estis iaspeca kontraŭulo de Lovro rilate la fundamentecon de Esperanto. Li, nome, estis preta ankaŭ akcepti kelkajn ŝanĝojn, kion Lovro, kiel strikta fundamenisto, ne povis toleri.

El tiu tempo ekzistas notitaj pluraj anekdotoj kaj ŝercoj, kiujn la kunfratoj de Lovro preparis por li, speciale dum liaj naskiĝtagoj.

Memoraĵojn pri li notas en sia libro "Jedan dan u životu fra Denisa Borovine narečenog Baksuz" ankaŭ frato Gracijan Biršić, sed ĉefa lia biografo estis Mato Batorović, kiu verkis ankaŭ nekrologojn kiuj aperis en diversaj katolikaj revuoj, kaj kies notoj grandparte estas uzitaj por ĉi tiu teksto. Tamen, neniu tiom detale skribis pri Lovro Kiš, kiom tion faris li mem en sia pli ol 100-paĝa manuskripto verkita en la kroata lingvo sub la titolo "Moje uspomene" (Ilok, 1981).

En la enkondukaj vortoj de tiu teksto, li kun nostalgio skribas pri sia malriĉa infanaĝo en familia kaduka dometo, pri konstruado de nova domo surborde de rivereto, por kiu ankaŭ li, tiam 4-jarulo, kun peno portis brikojn. Li parolas pri sia malbona sano, pro kiu li ne povis fariĝi metilernanto, kaj pro kiu la sorto gvidis lin al bonfarantaj homoj en la varaĵdina seminario. Li skribas pri siaj kunsortanoj, kaj multloke li mencias ankaŭ Esperanton. Interesaj notoj pri Esperanto datas el 1939, kiam en Ljubljana okazis kongreso de jugoslavijaj katolikaj esperantistoj (organizata de Peter Golobič, konata slovena esperantisto, poste elmigrinta al Usono), dum kiu li devis celebri meson, sed pro misvojiĝo, dum kiu li iris al malĝusta preĝejo, tio ne okazis. En 1970 li devis vojaĝi al katolika Esperanto-kongreso en Brno, sed la kongreso estis malpermesita de la ŝtataj institucioj. Iom simila situacio okazis dum la beograda Universala Kongreso, dum kiu devis okazi komuna kongreso de katolikoj kaj protestantoj esperantistoj (IKUE-KELI), sed la evento estis malpermesita.

VIZITO DE GERMANA SAMIDEANO

 Davor Grgat



S-ro Janek Bender, germana esperantisto el Stuttgart (librotenisto, laboranta ĉe la firmao "Bosch"), komence de marto vizitis la urbojn Split kaj Dubrovnik. Veninte per aviadilo la 1-an de marto al Split, kun sia gastiganto Davor Grgat li vizitis la plaj interesajn urbajn kultur-historiajn kaj turismajn vidindaĵojn. S-ro Janek unue vizitis Galerion Meštrović, poste la urban Esperanto-societon "Split", Kroatan popolan teatron, Arkeologian muzeon, kaj fine la Palacon de Diokleciano, en kies interno, sur Peristilo, troviĝas la plej frutempa preĝejo de sankta Duje, de sur kies pli ol 50-metrojn alta kampanilo

videblas la plaj bela panoramon de Split. Kvankam s-ro Janek en Split estis la unuan fojon (li jam vizitis la urbojn Zadar, Rijeka kaj Zagreb), li tre interesiĝis pri Kroatio, precipe pri ĉemaraĵ urboj. Li daŭrigis sian vojaĝon al Dubrovnik, kie helpe de s-ano Divo Pulitika dum tri tagoj li vizitadis la plej interesajn vidindaĵojn de Dubrovnik kaj de la insulo Korĉula. "Multaj homoj tra la mondo bone konas Split kaj Dubrovnik, kie ekzistas UNESKO mondheredaĵo. Pro kio mi ne uzu tiun eblecon", diris la vizitanto, kaj aldonis: "Krome, dum mi rigardas la belaĵojn kaj historiaĵojn, mi deziras ekkoni esperantistojn kaj uzi la lingvon, por ke mi atingu du celojn samtempe: ekkoni fremdajn landojn kaj uzi Esperanton". S-ro Janek estas esperantisto de 1983, kiam li partoprenis kvintagan kurson ĉe pastro Adolfo Burckhardt (tiam prezidanto de Kristana Esperanto-Ligo), kaj ekde tiam li vizitis kelkajn Universalajn Kongresoj de Esperanto, kaj per Pasporta Servo li ĉiujare vojaĝas kaj lernas Esperanton.

Li estis aliĝinta ankaŭ al la 36-a IKUE-kongreso en Romo, sed ankaŭ ĝin li ne partoprenis. El konataj esperantistoj persone li konis la faman Tibor Sekelj.

Pri la nomo de Lovro Kiš unufoje mi aŭdis meze de la 1980-aj jaroj, do nur kelkajn jarojn antaŭ lia morto. Ofte malantaŭ nia nescio kaŝiĝas veraj kaj fieraj herooj. Lovro Kiš, kiu ne partoprenis la Esperantajn aranĝojn certe estis tia persono. El la konstruaĵo de la franciskana monaĥejo, kiu fiere paradas super la kurbigoj de Danubo, sidante en la monaĥeja biblioteko, lia rigardo ofte sekvis la riverfluan. Al tiu monaĥejo, post gastama invito de la gvardiano

Oktavijan, mi venis la 5-an de novembro 2006. Al la bonintenca frato Oktavijan mi devas aparte danki pro lia bonvolemo. Li montris al mi du plenajn skatolojn da diversaj materialoj postlasitaj de Lovro Kiš: leteroj, fotoj, notoj ... Ĉie tra ili Esperanto estas neeviteble renkontata. Mi demandis, ĉu eblus detale pristudi la enhavon de la du skatoloj. La gvardiano faris ridetantan mienon kaj diris: "Prenu nur pijamon kaj venu!". Restas mia tasko reviziti la franciskan monaĥejon, ne nur pro la promeso farita al la gvardiano, sed ĉar tagon post tago mi renkontas nekonatajn sortojn de esperantistoj el nia pasinto. Ili meritas esti neforgesitaj.

DIAGNOZO: Redakcia kompilo KRONIKA MALSANO

BIBLIOTEKA KOLOKVO EN VIENO

Antaŭ preskaŭ duonjaro (la 19-an kaj 20-an de oktobro pasintjare) en Palaco Mollard en Vieno okazis kolokvo "Planlingvaj bibliotekoj kaj novaj teknologioj". Inicialis ĝin Herbert Mayer, direktoro de Esperanto-muzeo kaj la Kolekto por Planlingvoj de Aŭstria Nacia Biblioteko. Ne mirigas, ke la kolokvon kunvokis kaj financis la Aŭstria Nacia Biblioteko, ĉar ĝi apartenas al pinto de institucioj kiuj zorgas pri Esperanta spirita heredaĵo. En la alvoko, la celo de la kolokvo estis formulita jene: "prezenti la ĉefajn problemojn, kiujn frontas diversstaj planlingvaj bibliotekoj kaj arkivoj kaj kiuj estas solvendaj" kaj "La reciproka konatiĝo de la koncernaj respondeculoj, la komuna pridiskuto de la nuntempa rolo de niaj bibliotekoj kaj arkivoj, helpu al ni trovi konvenajn vojojn kaj metodojn por starigi kunlaboron kaj interhelpon."

La kolokvo okazis en bonaj teknikaj kondiĉoj kaj kun partopreno de pluraj movadaj respondeculoj pri tiu temo. Enkonduke prelegis la direktoro Mayer kaj poste Christian Cimpa,

lia kunlaboranto taskigita pri foto-arkivo. El iliaj prelegoj konkludeblas, ke Aŭstria Nacia Biblioteko konservas ankaŭ Esperantajn materialojn per plej modernaj teknologioj, kio en preskaŭ neniuj alia Esperanta arkivo estas efektivebla. Pri "Planlingvaj arkivoj - problemoj kaj praktikaj spertoj" prelegis Detlev Blanke, kiu faris kontrakton kun "Fondaĵo Arkivo de Partioj kaj Amasaj Organizaĵoj de GDR en la Federacia Arkivo", kiu transprenos kompletan arkivon de li kaj lia edzino Wera, por sekurigi ĝian konservadon.

Prelegis ankaŭ Utho Maier kaj Karl Heinz Schaeffer pri Germana Esperanto-Biblioteko en Aalen, Árpád Mathé pri "Periodaĵoj en bibliotekoj kaj libroj", Reinhard Haupenthal pri volapuko en arkivoj kaj bibliotekoj, Miroslav Malovec pri Esperanto-bibliotekoj en Ĉeĥio, Marek Blahuš pri propono starigi interretan superkatalogon, Toon Witkam komparis diversajn skanajn programojn por Esperantlingvaj tekstoj, Ljubomir Trifončovski parolis pri nuna stato de klubaj

bibliotekoj en Bulgario kaj Barbara Pietrzak pri siaj klopodoj konservi la sonarkivon de la Esperanto-redakcio de Pola Radio.

El ĉiuj prelegoj kaj diskutoj estis klare, ke savado kaj konservado de Esperantaĵoj dependas ne nur de Esperantomovado. Multfoje okazas, ke posteuloj de forpasintaj esperantistoj tute ne havas ian ajn deziron konservi la paperaĵojn, kaj nemalofte ili tuj post morto de la posedinto, forĵetas ĉion senkontrolle. Malhelpi tion estas praktike neeble.

Alia obstaklo estas protektado de dokumentoj, kiuj malaperas pro malzorgo en ŝimaj kaj humidaj ejoj pro longa kuŝado. Estis akcentita ankaŭ problemoj pri konstanta ŝanĝo de teknologio, kio malebligas unufoje por ĉiam konservi la materialojn. Restaŭrado de difektitaj raraĵoj estas ankaŭ grava problemoj, ĉar tion povas fari nur spertaj fakuloj kaj bone ekipitaj institucioj.

Tre grava malfacilaĵo estas ankaŭ malebleco utiligi la ekzistantajn dokumentojn, ĉar simple oni ne scias kie troviĝas kio pro manko de bonaj katalogoj.

En la tuta afero gravas, krom konstanta prizorgo, ankaŭ konstanta kunlaboro de ĉiuj kiuj okupiĝas pri konservado kaj kolektado de arkiva materialo, kio nemalofte mankas inter esperantistoj.

STATO DE ESPERANTAJ ARKIVOJ EN KROATIO



Eŭfemisme dirite, la situacio en Kroatio ne estas brila. La sorto de, al Nacia kaj Universitata Biblioteko en Zagrebo testamente lasita kolekto de le plej grava kroata historiisto kaj kolektanto Marinko Gjiivoje, eĉ 26 jarojn post lia morto ne estas konata, ĉar la institucio kiu transprenis la kolekton obstine rifuzas doni klarigon pri ĝi. En kelkaj societoj (Varaždin, Rijeka, "Bude Borjan" en Zagrebo, Kroata Fervoja Esperanto Asocio en Zagrebo), ekzistas relative grandaj librokolektoj, el kiuj plej bone prizorgita estas tiu en Rijeka (vidu la ĉi-apudan foton). La librokolekto konservata en Kroata Esperanto-Ligo fakte estas biblioteko de ĝia plej granda societo "Bude Borjan", kompletigita per kelkaj hereditaj kolektoj de unuopaj esperantistoj. Ĉe KEL troviĝas ankaŭ la plej granda arkivo de dokumentoj, sed post translokiĝo el Amruŝeva strato en novan sidejon en Kneza Mislava, ĝi kuŝas en provizora nekonvena tenejo, neatingebla

kaj malfacile uzebla por esplorado.

Dum 1980-aj jaroj, la usonano Jim Cushing provis almenaŭ la librofonduson en Zagrebo komputile katalogizi, sed rezulto de lia enorma laboro malaperis post preskaŭ tri jardekoj, pro "pruntoj", ŝteloj kaj translokiĝoj. Tio ja estas sorto de ĉiuj societaj bibliotekoj sen bona kaj konstanta prizorgo. La libro- kaj dokumento-kolekton poste iomete esploris kaj organizis Boris Ĉović, sed sen konstanta zorganto, la afero daŭre malpliboniĝas. Ĉar la sidejo de KEL en Kneza Mislava ne estos eterne uzata, kaj ĝia lokiĝo en la aĉetita ejo en Vodnikova 9 ne povas okazi pli frue ol KEL repagos la bankan krediton por aĉeto de Vodnikova (5-7 jaroj), oni povas por longa tempo forgesi pri bone organizita arkivo. Antaŭ pluraj jaroj konata esperantisto proponis al KEL por certa tempo translokiĝi la arkivon al lia urbo, kie li volontule liberigos ĝin de multaj nenecesaj papperajoj, kronologie ordigos ĝin, kopios la plej necesajn dokumentojn, skanos kaj disponigos ciferecajn kopiojn al pluraj societoj por ke ili estu konservataj diversloke kaj tiel estu evitita ilia perdiĝo kaj ebligita tuja uzado. La propono estis rifuzita de KEL sub preteksto, ke estas danĝere translokiĝi la arkivon, kvankam ĝi kuŝas en nekonvena loko kaj la sola profesiulo de KEL ne povas okupiĝi pri ĝi, dum alia persono ne troveblas.

La historio avertas, ke preskaŭ ĉiam kreskis nur privataj kolektoj, ĉar posedantoj ĉiam pli bone zorgas pri sia havaĵo ol societoj kiuj fondiĝas kaj malfondiĝas, ne havas konstantan membraron, sidejon kaj respondecajn prizorgantojn. Pluraj privataj kolektoj poste fariĝis seriozaj, protektitaj arkivoj. Jen ekzemploj: Biblioteko de Montagu Butler en Britio, kolekto de Luis Hernandez Yzal en Sant Pau d'Ordal (Hispanio), hungara kolekto de Károlyi Fajsz, belga kolekto de Cesar Vanbiervliet kaj eĉ la kolekto en Vieno realigita dank' al Hugo Steiner. Oscilado de kondiĉoj estas malpli granda ĉe seriozaj privataj posedantoj

ol ĉe Esperantaj societoj. Se foje okazas, ke iu kolekto pro forpaso de la posedanto estas malbone traktita de ties posteuloj, ankaŭ en tiuj kazoj multe kulpas la Movado mem. Multaj kolektoj malaperis

ĝuste pro malzorgo de funkciuloj de Esperantaj organizaĵoj pri siaj maljunaj membroj. Se oni agas konstante kaj honeste, homoj volonte donacas.

LA SOLA UTILIGEBLA ARKIVO

Projekto pri formado de INDOK-centro kaj ZEBIC (Zagreba Esperanto-biblioteko kaj dokumenta centro) estis planita jam antaŭ 25 jaroj de tiama Zagreba Esperanto-Ligo. Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj kiel daŭrigando de ZEL konstatas, ke la sola tuj uzebla kaj konstante uzata arkivo estas tiu de Josip Pleadin en Đurdevac, kies servojn senescepte uzas organizaĵoj kaj unuopuloj. Ĝi ekestis per pli ol 30-jara konstanta laboro de iama profesia esperantisto kaj nuntempa privata grafika entreprenisto. La kolekto konsistas el libro-, gazet-, foto- kaj filatela kolektoj, arkivo de dokumentoj kaj gazet-artikoloj, kaj kolekto de diversaj aliaj objektoj uzitaj de esperantistoj (flagoj, stampoj, afiŝoj, taglibroj, filmoj, insignoj...).

Avantaĝo de la kolekto estas ĝia situo je nur 120 kilometrojn de la kroatia metropolo. La posedanto konstante zorgas pri kolektado, ordigado, bindado de revuoj kaj servado al klientoj. Ĉar temas pri grafikisto kaj presisto, ekipita per teknikaj

kaj sperto, facilas kopii, skani, sendi per reto ien ajn, esplori surloke, aŭ peti servon de kiu ajn loko en la mondo. Helpas la aferon ankaŭ, ke la posedanto estas membro de Pasporta Servo, pro kio eblas ankaŭ loĝi senpage, kaj la pozitiva rilato de lia familio al Esperanto ĝenerale (la edzino estas pasiva esperantistino, la infanoj vizitadis UK-ojn) estas antaŭkondiĉo por kredi, ke la kolekto troviĝas en sekura loko. Dum pasintaj jardekoj Josip Pleadin serioze okupiĝis pri kolektado dise tra Kroatio kaj per interŝanĝo kun plej gravaj kolektantoj en la mondo. Ĉar eĉ KEL uzas ofte liajn servojn, Unuiĝo de Zagrebaj Esperantistoj decidis doni sian (nematerian) aŭspicion kaj plenan subtenon, invitante ĉiujn konfidi siajn esperantaĵojn donace aŭ prunte al la kolekto, kaj petas eldonistojn kaj aŭtorojn donaci ekzemplerojn de siaj verkoj al:

Josip Pleadin
Bana Jelačića 138A
HR-48350 Đurdevac
Kroatio
josip.pleadin@gmail.com



Parto de la kolekto Pleadin en 2005, ekde kiam ĝi duobliĝis



Vulkana pejzaĝo en Javo

Estis januaro 2007 kaj tro longe mi jam estis en Lahoro. Mia biciklista koro devis daŭrigi. Kiam mi alvenis al la pakistana oficejo de migrado ĉe la landlimo al Hindujo, tie jam atendis alia biciklisto. Ni tuj interkonatiĝis. Mohamed el Irano biciklas ĉirkaŭ la mondo kun la celo planti arbon en ĉiu urbo kiun li pasas, por atentigi la homaron, ke ni bezonas arbojn (vidu: www.weneedtrees.com). Kune ni daŭrigis al la pordegoj por Hindujo. De tie multaj ruĝvestitaj homoj venadis en vico kiel formikoj, ĉiuj portante sakon kun terpomoj au cepoj sur siaj kapoj, kaj aliaj ruĝvestitaj homoj iris tien kun skatoloj sur siaj kapoj. Strange, ni pensis. Kio okazas? Iom poste ni vidis, ke en la mezo inter la du landlimaj pordegoj la ruĝvestitaj homoj transdonis la skatolojn al bluvestitaj homoj el Hindujo, kaj ricevis de ili la pezajn sakojn. Ni montris niajn pasportojn al la soldatoj kiuj supervidis tiun transliman varinterŝanĝon, kaj ni povis trapasi.

Jam 30 kilometrojn post la landlimo en la urbo Amritsar kun ĝia belegra ora templo kaj multaj biciklo-rikŝoj ni restis dum tri tagoj. Mohamed invitis min planti arbojn en la botanika ĝardeno kun la helpo de la urba hortikultura inĝeniero. Bicikli kaj planti arbojn, kia bela simbolo por la vivo kaj la paco! De Amritsar la vojoj de mi kaj Mohamed jam disigiĝis. La biciklisto el dezertplena Irano stiris norden al la himalaja montaro, la biciklisto el montara Svislando stiris suden por trapasi la dezerton de Rajastan.

Tra lokoj kiel Jaipur kun ĝiaj ruĝaj konstruaĵoj, Bharatpur

kun fortikaĵo kaj nacia parko plena je birdoj, Agra kun la mondfama Taj Mahal, Orchha kaj Kajhuraŝ kun iliaj hindaj temploj, mi atingis la tute nekonatan urbon Ajaygarh, kie mi estis invitita de viro nomita Ajay, amiko de amiko. Tridek kilometrojn antaŭ Ajaygarh la sosejo malaperis kaj iom poste mi renkontis homojn, kiuj vojaĝis per elefanto. En Ajaygarh mi demandis pri la vojo al la palaco, kiel telefone al mi klarigis Ajay. Kaj prave, oni indikis al mi la vojon al malnova grandega domo. La pordego estis malfermita kaj mi eniris. Servanto bonvenigis min kaj vokis Ajay. Nur tiam mi komprenis, ke Ajay estas la Maharaĝo de Ajaygarh. Proksimume miaaĝa, li estas la plej maljuna filo de la iama reganto de tiu urbo, kaj kvankam formale li ne plu havas iun povon, li ankoraŭ estas respektata de la tuta loĝantaro. La homoj kliniĝis antaŭ ni, kiam, ĉirkaŭite de pluraj servantoj, ni piede trapasis la urbon por viziti kelkajn belajn malnovajn sed forgesitajn templojn en la arbaro sur la apuda monteto.

En la urbo Varanasi ĉe la rivero Gango, kelkajn tagojn poste mi denove renkontis Mohamed. Ĉi-foje ni plantis arbojn ĉe budhista lernejo kun la lernantoj. En Varanasi mi restis preskaŭ tutan semajnon, ĉar ĉi-tie mi devintus preni gravan decidon: Kien daŭrigi?

Teorie, forlasi Hindujojn

orienten eblas nur per flugiloj. Praktike, mi volis prui la malon. Unu ebleco estus iri norden kaj provi la vojon tra Nepalo, Tibeto kaj Ĉinio, por atingi Vjetnamion. Sed, laŭ multaj raportoj, la ĉinaj oficistoj ne permesas eniri Tibeton el Nepalo per biciklo, kvankam tiu vojo estas bone konata ĉe biciklantoj aldirektaj. Ĉu tamen mi provu?

Ne, finfine mi decidis daŭrigi orienten al Kolkato. De tie estus vojo tra Burmao. Sed ankaŭ tiu vojo ŝajnis malebla, ĉar laŭ miaj informoj oni ne povas ricevi la necesajn permesojn, nek por trapasi la nordorientajn provincojn de Hindujo, nek por iri de centra Burmao orienten al Tajlando. Do anstataŭ perdi tempon diskutante kun oficistoj mi decidis tuj provi la vojon tra la maro. Per ŝipo mi volis atingi Tajlandon, kvankam multaj homoj diris al mi, ke ankaŭ tio ne eblas.

Kvar tagojn daŭris la vojaĝo per regula ŝipo el Kolkato al Port Blair, la ĉefurbo de la Andamanaj insuloj. Tiuj insuloj estas pli proksimaj al Tajlando ol al Hindujo, tamen ili ankoraŭ apartenas al Hindujo. La tagon post mia alveno en Port Blair mi tuj provis trovi ŝipon al sudorienta Azio. Kiel mi jam atendis, ŝajne nek pasaĝera, nek kargo-, nek fiŝista ŝipo iris tien. Mi do devos petveturi jahton.

Estis la fino de la sezono, kaj tiun tagon estis ankrita nur unu eta motorjahto antaŭ la haveno. Mi tuj ekkonsciis, ke petveturado ne estos facila. Mi do preparis afiŝojn pri mia peto, distribuis ilin al la havenmastro, al jahtagento, kaj gluis ilin al taŭgaj lokoj en la haveno. Dum la venontaj tagoj, ĉiam kiam mi vidis novan jahton, mi sidis ĉe la marbordo kaj atendis ĝis kiam el iu jahto alteriĝos homo, al kiu mi klarigos mian peton kaj transdonos la afiŝon kun miaj kontaktdetaloj. Mi estis bonŝanca. Jam post tri tagoj mi trovis jahton kiu akceptis preni min al Phuket. Estis velŝipo de svisa paro, kiu ĝojis esti akompanata de samlandano por la kvartaga pasaĝo al Phuket.

Survoje el Tajlando al Indonezio mi renkontis Mohamed trian fojon. El Varanasi li estis biciklinta al Katmanduo en Nepalo, de kie per aviadilo li alvenis en Kuala-



Vendoplaco en Ajaygarh

vojaĝo de la ruĝa biciklo

 Benno Frauchiger

25.000-kilometra aventuro de svisa esperantisto



Pluvarbaro en Indonezio

Lumpuro, la ĉefurbo de Malajσιο. Ni iomete kune biciklis, kaj kiel simbolon de nia amikeco ... ni plantis arbon.

En la indonezia insulo Sumatro mi trapasis la ekvatoron kaj baldaŭ mi havis la senton bicikli de iu paradiso al alia paradiso. Iun tagon mi promenis min tra la rizkampoj de la valo Harau, ĉirkaŭita per ŝtonegaj muregoj kun freŝigantaj akvofaloj sub kiuj sin duŝis kaj banis infanoj. Tagon poste mi subeniris straton en kratero de iama vulkano por trovi gajetosan gastejon ĉe la bordo de la kvieta kraterlago. Alian tagon poste mi troviĝis ĉe la marbordo kun senfinaj kaj senhomaj blankaj plaĝoj kaj palmoj. Kaj ĉiam kiam mi pasis tra vilaĝoj oni salutis min el ĉiuj domoj. "Hello Mister!", "Good Morning, Mister!", aŭ "Mau ke mana, Mister?" la homoj kriis kiam ili vidis min. Tamen, angle neniu parolis.

En Indonezio ankaŭ estas multaj aktivaj vulkanoj kaj mi decidis, ke mi volas supreniri unu el tiuj vulkanoj, la vulkanon Bromo. Post unu tago da biciklado mi antingis la 2700 metrojn altan pinton de Gunung Penanjakan, la plej alta loko sur la bordo de antikva kratero, en kiu troviĝas la du vulkanoj: Bromo kaj Brentok, kaj en la horizonto videblis ankoraŭ tria, pli alta vulkano, la vulkano Semeru, kiu elŝutas grandan nubon da fumo ĉiun duonhoron. Post ĝuo de tiun belegan spektaklo mi trairis tiun bizaran pejzaĝon por subeniri je la alia flanko tra belega vojetoj en tropika pluvarbaro.

En Balio mi festis la unuan datrevenon de mia foriro el Svislando. Estas mirinda, mi pensis, ke nur per mia modesta homa forto mi jam atingis Balion en nur unu jaro, tiel malgranda estas nia planedo. Sed kiel festi tiun datrevenon? Ĉu simple malfermi bieron? Ĉu inviti nekonatajn homojn al vespermanĝo? Ĉu grimpi iun monton? Ne. Anstataŭe mi partoprenis la unuan internacian triatlonon de Balio, kiu hazarde okazis je la sama tago. Ankoraŭ neniam mi partoprenis triatlonon, sed mi ja havas biciklon! Kaj mi ankaŭ povas naĝi kaj kuri. Tri tagojn antaŭ la konkurso mi alvenis al Balio ĝustatempe por ankoraŭ iomete preparadi min kun aliaj atletoj kaj tiel interkonatiĝi. Niaj bicikloj estis baptitaj de Bali-a (hindua) preĝisto, kaj dimanĉon, la 24an de junio, ni estis pretaj. La triatlon komenciĝis per 1,5 km da naĝado en la maro. Sed mi ne bone naĝas, do kiam mi elakviĝis mi jam estis unu el la lastaj atletoj. Sed tio ne gravis. Krome mi havis la plej pezan biciklon, faritan el feraĵo kaj kun senutilaj portiloj. Sed ankaŭ tio ne gravis. Por mi, kiu kutime biciklas plensarĝite, la biciklo estis sufiĉe malpeza. Ĉiukaze, ŝajnis, ke 40 kilometroj da biciklado tute ne plu povis lacigi min, tiel ke dum la finaj 10 kilometroj da kurado mi preterpasis almenaŭ la duono de la aliaj atletoj por kontente alveni al la fina linio.

Meze de julio 2007 dum kvar tagoj la ondoj de la Timora maro kaj la ventego ludis kun la eta fiŝista ŝipo, kiu prenis min el Kupang al Darwin. Kiam ni alvenis al Darwin, mi saltis pro ĝojo. Revo plenumiĝis!

Mi alvenis al Aŭstralio el Svislando sen flugi, nur per biciklo kaj boato. Ankoraŭ mi ne estis en Carnamah, mia fina celo, ankoraŭ estos almenaŭ 6000 kilometroj antaŭ mi, kvarono de la vojo. Sed jam mi estis en Aŭstralio. Kia miraklo! Mi volis brakumi la tutan mondon.

Sed kiam mi unue promenis en la stratoj de Darwin mi estis seniluzigita. Mi rigardis al la homoj, kaj salutadis ilin, sed apenaŭ ili reagis. Sur la tuta vojo en Azio la homoj rigardis, ridetis kaj salutis min. Miloj da "Hello Mister!" ankoraŭ eĥis en miaj oreloj. Sed ĉi-tie, oni apenaŭ rimarkis min. Krom unu viro, kiu sidis sub arbo antaŭ la turisma oficejo kaj kiu rigardis min rekte en la okulojn. "Hello!" mi diris ridetante kiam mi pasis, kaj same li respondis kaj ankaŭ ridetis. Finfine mi trovis lokulon, mi pensis - tute ne malprave. Li estis la unua aborigeno kiun mi vidis. Samtempe mi tamen ekkonsciis, ke en tiu lando mi devus alktimiĝi, ke blankuloj ne nur estas turistoj sed ankaŭ konsideras sin kiel lokuloj.

Bicikli en Aŭstralio estas tute alia afero ol en Azio, ne nur pro la homoj. Fakte, oni povus preskaŭ diri, ne estas homoj en Aŭstralio. Centoj da kilometroj sen domo, sen akvo, sen io, nur vojo, arbetoj, arboj, floroj, birdoj, ŝtonoj. En Azio mi malofte kuiris mem, plej ofte mi trovis malmultekostan restoracion, malofte mi dormis en mia tendo, plej ofte mi trovis malmultekostan hotelon. En Aŭstralio mi plej ofte kuiris mem, mi plej ofte dormis en mia tendo, ĉar plej ofte tute ne estas restoracio aŭ hotelo.



Alveno al la fina stacio: Carnamah en Aŭstralio

➔ *daŭrigo el la paĝo 53*

Tra la regiono de Kimberley en la nordo de Okcidentaŭstralio, tra la dezerto de Tanami kaj tra la urbon Alice Springs mi atingis la Ŝtonegon Uluru (ankaŭ nomita Ayers Rock). Jam dufoje antaŭe mi vizitis ĝin. La unuan fojon antaŭ 15 jaroj dum vojaĝo tra Aŭstralio kiel interŝanĝa lernanto. Tiam mi grimpis ĝin, kvankam la lokaj aborigenoj tion ne ŝatas. Por ili Uluru estas sankta ŝtono. Sed tiam mi ne nur grimpis, ankaŭ mi kunportis etan pecon kiun mi trovis sur ĝia supro. Dum multaj jaroj mi havis tiun ŝtonpecon sur mia skribotablo en Svislando. Tie ĝi kolektis la polvon de la urbo anstataŭ la polvon de la dezerto. Ĝi aspektis malbela kaj malfeliĉa, kaj mi sentis, ke tiu ŝtonpeco apartenas al Uluru, kaj tute ne al skribotablo en Svislando. Kiam mi ekkomencis mian bicikladon al Aŭstralio, mi tial decidis ke mi kunportos tiun ŝtonpecon por redoni ĝin al Uluru.

Alveninta ĉe Uluru, mi prenis la ŝtoneton en mian poŝon kaj promenis ĉirkaŭ ĝia grandega patro. Uluru estas la dua plej granda monolito, 400 metrojn ĝi elstaras el la tero, kaj estas 10 kilometroj ĉirkaŭ ĝia bazo. Post mia duhora promenado mi iris al la ĉefoficejo de la nacia parko, por renkonti respondeculon pri la parko kaj reprezentantinon de la lokaj aborigenoj, al kiu mi redonis la ŝtonon. Ŝi danke akceptis ĝin. Pli poste, kiam mi ree estis en la kampadejo mi kontente sentis, ke la ŝtono nun denove estas hejme, en la loko, al kiu ĝi apartenas, post preskaŭ 15 jaroj, kaj post bicikla vojaĝo je pli ol 20.000 km. Sed kiel pri mi? Jen mi estas en stranga loko, meze de iu kontinento ĉe la alia flanko de la mondo. Kvankam mi ĝuis esti tie, mi iel sentis, ke tiu loko ne estas mia hejmo, mi ĉi-tien ne apartenas. Mia haŭto ne estas nigra. Do nun estas ankoraŭ mi, kiu devus iri hejmen. Ankaŭ Carnamah ne estos mia hejmo. Sur mia longa vojo hejmen ĝi nur estas loko kie mi haltos, ĉar tie loĝas miaj amikoj.

La plej rekta vojo el Uluru por atingi Carnamah norde de Perto en Okcidentaŭstralio estas laŭ la "Great Central Road" (granda centra vojo). Estas nepavimita vojo. Pri la kondiĉoj mi nur scii, ke foje estas sablo, foje ŝtonetoj sur vojo pasebla por ĉiaterena

veturilo. Sed ĉu ankaŭ per biciklo? Mi scii, ke plurfoje estos pli ol 200 km inter lokoj kun akvo. Sed mi ne hezitis, ĉar jam mi havis la necesajn permesojn por trapasi la aborigenajn teritoriojn sur tiu vojo, kaj la alternativo tra ŝosea vojo estus almenaŭ 2.000 kilometrojn pli longa. Mi informis la policon pri mia biciklado, aĉetis mangajon por 12 tagoj, pakis 22 litrojn da akvo kaj survojiĝis.

La vojo ne estis facila, sed des pli bela. Foje por pluraj kilometroj mi devis puŝi la biciklon tra la sablo, kiu iĝis tro mola. Estis iomete absurda situacio. Pli ol cent kilometroj for de la plej proksima domo en la varmega dezerto de Aŭstralio jen mi, puŝante tra la sablo ŝarĝitan biciklon kiu pezas pli ol 80 kilogramojn. Tamen, mi sentis min sufiĉe sekura. Ĉiutage mi renkontis eble dek veturilojn, kiuj povus helpi, se necesa. Ofte ili haltis por demandi, se mi bezonas akvon, aŭ foje por amike diri ke mi estas freneza. Plene mi ĝuis la solecon de la vojo kaj la naturon ĉirkaŭ mi. Kvankam tiel nomata dezerto, estas multe da plantoj kaj bestoj ĉirkaŭ mi. Ĉiutage post la kuirita vespermanĝo mi kuŝiĝis min tere kaj longe rigardis la stelojn en la ĉielo, ĝis kiam mi iris dormi en mian tendon. Nur je unu vespero dingo (sovaĝa aŭstralia hundo) proksime de mia tendo observis min per siaj brilantaj okuloj. Tiam mi frue kaŝis min en la tendo. Ĉiujn du aŭ tri tagojn mi pasis stratdomon aŭ aborigenan komunumon, kie mi povis preni akvon kaj aĉeti malvarmigitan trinkaĵon aŭ iom da pano.

Kiel planita, post 12 tagoj mi alvenis en Laverton, la unua vilaĝo, kie denove komenciĝis la ŝoseo. Tri semajnojn poste mi alvenis al Perto, kie mi renkontis mian fratinnon, alvenintan el Svislando. Por festi mian alvenon al Perto, kie mi antaŭ 15 jaroj vivis kiel interŝanĝa lernanto, mi partoprenis maratonon sur la insulo Rottneŝt antaŭ la urbo Perto. Kaj post aliaj kvar tagoj da biciklado mi finfine alvenis al la fermbieno de miaj amikoj en Carnamah. La celo de mia vojaĝo estis atingita.

Dum tri monatoj mi restis en Carnamah kaj en Perto. Kaj je la fino de januaro 2008 mi enŝipiĝis en Fremantle por reveni tra Singapuro al Eŭropo. Nun mi ĵus alvenis en la havenon de Genovo. Ankoraŭ mi devas hejmenbicikli al Svislando tra la enneĝigitaj Alpoj.

 **Radenko Milošević**

Iuj el niaj legantoj rimarkis frontpaĝe de la unua ĉi-jara numero de "Zagreba Esperantisto" ian nekompreneblan kaj nelegeblan tekston, skribitan en nekonata alfabeto. Ĝi estis per glagolicaj literoj skribita la nomo de mia gazeto. Glagolico estis skribo kiun dum dekunu jarcentoj uzis kroatoj, samtempe kun aliaj skriboj, speciale tiu latina.

Prakomenco de komunikado inter homoj estis diversmaniere kunmetitaj ŝtonetoj, branĉetoj aŭ nodetoj, kiel ĉe sudamerikaj indianoj. Kredeble la plej malnova perlitera komunikado pli vaste uzita estis t.n. logogramoj signifantaj unuopajn vortojn. Iom post iom tio ŝanĝiĝis al la unua konata fonetika skribo nomata "kojnoscrito" ĉe sumeranoj en Mezopotamio, proksimume en la 34-a jarcento a.K. Dum mia prelego en Triesto en la jaro 2005, demandinte la ĉeestantojn kiom da skriboj ili konas, mi ricevis silentan respondon. Neniu rememoris pri greka, cirila, gota aŭ eĉ pri runa alfabetoj kaj skriboj.

Glagolico, kiel skribo de kroatoj, estis ilo de alfabeteco, en kiu dum jarcentoj estis en ŝtonabuloj ĉizitaj kaj papere skribitaj tre valoraj verkoj kaj presitaj unuaj kroataj misaloj kaj brevieroj. En presita formo glagolico aperis iomete post la gutenberga presmaŝino. Interalie, per glagolicaj libroj tre decide kroata pastraro celebris la sanktajn mesojn en la propra kroata lingvo. Kroatoj estis la sola popolo kiu ĝis la Dua Vatikana koncilio, rajtis celebri meson en propra nacia lingvo.

Ekde la 12-a jarcento glagolico seninterrompe funkciis en kroataj landoj, aparte en liturgio. Verdire, ankaŭ bulgaroj kaj ĉeĥoj dum proksimume unu jarcento uzis glagolicon. Kiam ĝi ŝanĝiĝis al sia "angulforma" varianto, ĝi definitive fariĝis "kroata skribo", kiel ĝin prezentas la ĉi-apuda bildo.

Glagolico dum kvin jarcentojn estis plej multe aplikata en Kroatio paralele kun la latina skribo kaj malnova kroata-slava

GLAGOLICO – KIO ĜI ESTAS?

lingvo en liturgio, malgraŭ tio ke la latina venadis per tekstoj el Vatikano. La uzo de glagolica kaj la latina inter kroatoj ĉiam kunvivadis. Ambaŭ tradicioj en la kroata literaturo estas nur partoj de la sama tutaj. Aŭstria aŭtoritatoj malpermesis lernadon de glagolico en la jaro 1862.

La unua kroata alfabetlibro por infanoj (vidu la dekstran bildon) estis presita en Venecio en la jaro 1527. La lernolibro entenis, interalie, ankaŭ la preĝojn "Patro nia" kaj "Ave Maria". Kelkaj konservitaj ekzempleroj troviĝas en Novjorko, Oksfordo, Vieno, kaj Petroburgo.

Dum jarcentoj la nomo de glagolico signifis diversajn aferojn. En malnova literaturo oni povas trovi eĉ la esprimon "glagola lingvo", kion oni pravigas per kernosignifo de malnova kroata-slava vorto "glagolati" (= paroli). Tra la historio oni nomis glagolicon ankaŭ "la kroata skribo". Nuntempe oni sub la nomo *glagolico* komprenas: 1) glagolicajn literojn, 2) kroatian malnovslavan diservon aŭ liturgion kaj 3) ĉion kio estas skribita per glagolico.

Ekzistas multaj teorioj pri ekapero kaj origino de glagolica skribo. Kompreneble, ke la riĉeco de glagolica skribo en la miljara kroata periodo de ĝia uzado estas fruktoplana kampo por diversaj supozoj pri ĝia origino. Evoluon de grafisma sistemo de glagolico en la kroata teritorio oni povas continue observi ekde la 11-a ĝis la komenco de la 19-a jarcentoj. Menciendas, ke



iuj literoj estas voĉe kaj grafisme parencaj, kiel: k, g, h aŭ t, d. Inter pli ol kvardek teorioj pri aŭtoroj de la literoj, oni taksos nur kelkajn: de Cirilo-Metoda origino el cirila skribo, trans simileco kun gotaj runoj, deveno el etiopia, armenia aŭ hetita, aŭ prototipe hinda... Tamen tre gravas mencii, ke ekster la kroata etna spaco ne ekzistas eĉ unu konata ŝtonĉizita glagolica teksto.

Multfoje oni pensas, ke glagolico estas iaspeca pazigrafio. Simile al la personoj, kiuj ne konante ion ajn pri Esperanto demadas: Ĉu oni povas konversacii, skribi poemojn kaj ĝenerale sciencu uz - Esperanton? Ankaŭ ĉe glagolico estas simila demando: Ĉu ĝi estas nur libra, brevieria skribo? Tute ne! Ĝi estis uzata kiel skribo libra, sed ankaŭ kiel skribo en ĉiutaga vivo: en korespondado

kaj en skribaĵoj de ĉefpreĝejoj pri mortintoj, memoraj diservoj kaj en mesaj protokoloj.

Tabulo de Baška (vidu ĉi-sube) estas unu el inter la plej gravaj monumentoj de glagolica skribo. Ĝi estas trovita sur la insulo Krk en la preĝejo de Sankta Lucija (vidu ĉi-supre). Malkovris ĝin en la jaro 1851 fama kroata verkisto kaj politikisto Ivan Kukuljević - Sakkinski. Li ne scipovis legi la tekston, sed li daŭre obstine serĉis glagolicon heredaĵon, kaj trovis entute 27 glagolicajn librojn, inter kiuj unu el la jaro 1321. Dimensioj de la tabulo estas 197 x 99 cm, ĝia dikeco estas 8 centimetrojn, kaj pezo okcent kilogramojn. La teksto estas skribita en dektri linioj. La tabulo de Baška atestas, ke en la 10-a kaj 11-a jarcentoj en la teritorio de Kroatio ekzistis nacia literaturo kun nacia skribo, pli frue ol ĉe multaj aliaj eŭropaj popoloj.



PRI LA SIMBOLO DE ESPERANTO LAŬ MATEMATIKISTA MANIERO

 *Violeta*

Ankoraŭ pasintjare, nian redakcion atingis ampleksa materialo matematike-geometria, verkita de profesia matematikistino. El la ricevita materialo ni elektis nur la parton pri stelo, kiu estas malnova simbolo de nia Movado. Jen kiel pri ĝi pensas kaj ĝin vidas matematikistoj.


En slavaj lingvoj, kaj supezeble ankaŭ en aliaj lingvoj, la vorto "pet" = kvin, kaj la vorto "pest" = pugno, estas parencaj. En la persa "deste" = manoj, en la slava "deset" = dek, samsignifa al la latina "deci" aŭ greka "deka". Homoj kaj multaj animaloj havas kvin (respektive dek kaj dudek) fingrojn. Pro tio la homaro konstruis dekuman sistemon de nombrado. Niaj kvin fingroj kaj nombroj kvin kaj dek, estas bazo por nombrado, bazo de matematiko, tekniko, respektive ankaŭ de homa civilizo.

Multaj floroj havas kvin petalojn. Se pomon, piron, cidonion ni distranĉas tra ĝia "ekvatoro", ni rimarkos en ĝia mezo la semgrajnojn en eta kvinpinta. Maraj animaloj nomataj ehinodermoj (lat. Echinodermata), konsistas el kvin samaj partoj. Homoj multfoje rigardis "marajn stelojn". Mi opinias, ke kvinpintan stelon homoj desegnis pli frue ol cervojn kaj bubalojn.


Kvinpintan stelon ni povas desegni per unu kontinua linio, ne levante skribilon el la desegnaĵo, jene: unue ni desegnu kvin punktojn




kiuj estas pintoj de stelo. Poste ni signas la punktojn per numeroj








Kiam ĉiuj kvin punktoj havas numerojn, ni ne haltu, sed ni daŭre cirkuli. Al la punkto havinta numeron 1, ni donu numeron 6, al punkto 2 - numeron 7, al punkto 3 - numeron 8 ktp.




Se ni kunligas ĉiujn punktojn 1 → 2 → 3 → 4 → 5 → 6 → 7... laŭvice, ni ricevos kvinangulon.




Stelon ni ricevos, se ni kunligas nur malparajn numerojn, ellasante la parajn: 1 → 3 → 5 → 7 → 9 → 11 → 13 → 15 ... Ni povas cirkuli ankaŭ inverse: 11 → 9 → 7 → 5 → 3 → 1, aŭ komenci ekde ĉiu ajn punkto: 5 → 7 → 9 → 11 → 13 → 15 ...




Se stelo desegnita ne estas bela,



se unu parto estas tro granda kaj alia tro malgranda, ni devas en la komenco, loki la kvin punktojn pli precize. Preferinde ni desegnu cirklon kaj poste kvin punktojn sur ĝi.



Ni povas desegni cirklon per metala monero, per malgranda poto, per ŝnuro kies unu flankon ni fiksas kaj per la alia ni cirkulas. Se kvin punktojn ni desegnis simile al domo, tiam la steloj estos neplaĉaj.




La desegnaĵo devus aspekti tiel:




Metinte la punktojn, ni plibonigadu plurfoje, rigardante de ĉiuj flankoj. Nur se ni estas kontentaj pri la pozicio de punktoj, ni estos kontentaj ankaŭ pri la stelo.

Se ĉiujn kvin punktojn ni kunligas per cirkla centro




ni konstatas, ke ĉiuj kvin partoj devas esti samaj. Se ni havas angulilon, ni povas desegni pli precize kaj pli facile. En la centro

ni disdividu $360^\circ : 5 = 72^\circ$. Do, la anguloj ĉe la centro devas esti 72° . Unue ni desegnu cirklon, kaj ni signu ĝian centron per 0 kaj punkton 1 jene:




Poste ĉe la centro, ekde linio 01, ni mezuru angulon de 72° , ripetante la samon por punktoj 3, 4 kaj 5.




Kiam ni havas ĉiujn punktojn, ni kontrolu la angulon inter 05 kaj 01. Tiu devus egali al 72° .


Se ni kunligas najbarajn punktojn 1 2 3 4 5, ni ricevos kvinangulon.



Se tiujn ĉi liniojn ni plilongigas



ni ricevos novan pli grandan stelon.



STUDO PRI AKADEMIANO DALIBOR BROZOVIĆ

Akademian Dalibor Brozović, Honora Patrono de UEA, prezidanto de Kroata Esperanto-Ligo, elstara kroata lingvisto kaj slavisto, 80-jariĝis en 2007. Tiuokaze en la Universitato de Zadar kie li lektiis pri lingvistiko, estis organizita simpozio dediĉita al lia laboro. Nikola Rašić estis invitita prelegi pri li kiel esperantisto, esperantologo kaj interlingvisto, pri kio Brozović aperigis nemultajn, sed ja gravajn studojn (ekz. pri litovaj influoj en Esperanto kaj pri pozicio de Esperanto en lingvistika tipologio). En 2007 Rašić ne povis persone ĉeesti la simpozion, sed akceptis verki ĉapitron por la Memrolibro. Temas pri studo de ĉirkaŭ 70 paĝoj kiu prezentas ĉiujn esperantologiajn kaj interlingvistikajn verkojn de Brozović, sed ankaŭ traktas lian originalan poezion en Esperanto kaj tradukojn. Rašić konkludas, ke la esperantisteco de Brozović havis rimarkeblan influon je lia laboro kiel lingvisto. Se li ne estintus esperantisto, li ne estus tia lingvisto kian ni konas. Brozović mem elstarigas sian esperantistecon en ĉiuj okazoj. La Memrolibro planatas aperi jarfine.

RUĜBRIKA PONTO EN SISAK

Judita Rey Hudeček

Kroata Esperanto-Ligo pliriĉiĝis je unu nova societo. En ĝia arkivo estos notite, ke la 27-an de februaro 2008 okazis fondkunveno de Esperanto-societo en Sisak. Iuj postaj esplorantoj de la movada historio en Kroatio rimarkos ankaŭ la fakton, ke temis pri dua fondkunveno de societo en Sisak, ĉar jam ekde la jaro 1978 en Sisak dum certa tempo funkciis Esperanto-societo, sed ĝi, samkiel aliaj aferoj en tiu urbo, dronis en malfacilaj tempoj. Inter la faktoj estos notite ankaŭ, ke la fondkunveno en 2008 okazis en la konstruaĵo de Kulturcentro "Kristalna kocka vedrine" (Kristala kubo da sereno), iama teatrejo. Tie ĉesos la intereso pri la evento. Neniu interesos, ke la kunveno okazis en la ejo, kies fenestroj estas turnitaj rekte al unu el la simboloj de la urbo Sisak - al ĝia Malnova ponto. Ĉi tiu unika ruĝ-blanka belulo, konstruita el brikoj en la tempo kiam pontoj dise tra Eŭropo kutime estis konstruataj el cemento kaj betono, kiu kunligas la maldekstran kun la dekstra bordojn de la rivero Kupa, preskaŭ ĉeestis la fondkunvenon. Escepta ponto donis sian kontribuon al escepta lingvo, kiu samkiel ĝi celas kunligi disigitajn.

Pri pontoj kaj ilia simboleco ekzistas tiom da skribitaj tekstoj, ke preskaŭ superfluas ion ajn aldoni ... Ili kunligas homojn, popolojn, ŝtatojn, kulturojn ... sub pontoj fluas riveroj kaj sur ili la vivo. Transversigaĵas kulturoj, lingvoj, scioj, spertoj ... ĉio, kio homojn faras homoj. Eble ĝuste pro tio en militaj tempoj, kiam homoj ĉesas esti homoj, pontoj pereas kune kun ili. Pontoj detruigaĵas kune kun homa homeco.

En tempo de militaj frenezaĵoj oni parolas pri genocidoj, kulturocidoj, ekocidoj, neniam pri pontocidoj. Kiel ja oni povus nomi sisteman detruadon de pontoj,

ilian ekstermadon? Ĉu ekzistas ia konvena vorto? Certe "pontocido" konvenus.

Gravas post paso de freneziĝoj, rekonstrui pontojn. Pontojn ĉiaspacajn. Kaj tiam ĉiuj fieras, feste vestitaj tranĉas rubandojn, solene paroladas ... la vivo pluiras laŭ propra fluo.

Kion en tiu momento faras ponto-detruantoj? Kun pli aŭ malpli da ponto kaj konscienciproĉo ili sciigas: ni devis fari, estis ordono tia ...

Sed ĉu ĝuste ĉiam estis tiel? Ĉu per frenezula obeemo oni devas ĉiam plenumi ordonojn de frenezuloj? Ĉu unuopulo sen kontraŭstaro devas atropreni en komuna frenezaĵo? La ponto en Sisak povus diri ion pri tiu temo ...

Sisak estis ne malgranda setlejo sed vera urbo jam antaŭ 2400 jaroj, ankoraŭ en la tempo kiam lin vizitadis keltoj kiuj miksiĝis kun lokaj iliroj kaj donis al ĝi la nomon Segestica. Poste ĝi fariĝis Siscia, la ĉefurbo de romia provinco Pannonia Savia, kaj moneroj forĝitaj en ĝi, sekvante la romian soldataron, atingadis ĉiujn parton de Romia Imperio. Per ĝi oni pagadis eĉ en Palestino.

Multaj soldataroj kaj konkerantoj kun ŝangebla bonŝanco trapasis ĝiajn riverojn Kupa, Sava kaj Odra. Iuj ne sukcesis. Multaj turkaj soldatoj en la bataloj ĉe Sisak trovis sian lastan kuŝejon surfunde de la riveroj Kupa kaj Sava. La travivintoj ne kolektis sufiĉan forton por plua konkerado de Eŭropo. Sisak kaj ĝiaj riveroj al kroatoj akiris la nomon "antaŭmuro de kristanismo". Ĉiu terpeco de Sisak kaŝas iun sekreton. La materiajn oni iam malkovras, sed ekzistas ankaŭ aliaj, forpasantaj kun homoj en kiuj ili estas konservitaj.

La fondkunveno de Esperanto-societo en Sisak estis okazo por konservi unu tian el forgeso. Ĝi ne estas el fora historio, sed el la tempo de la dua mondmilito.

Ĉiu milito provokas neantaŭvideblajn, ofte tragikajn eventojn, kaj malaperon de ĉiu ŝtato kaj ŝanĝon de regantoj sekvas malordo en urbaj stratoj kaj en homaj kapoj. Tiaj tempoj estas okazoj por alporti en taglumon la plej malbonajn, sed ankaŭ plej bonajn homajn ecojn.

Kiam en 1941 detruigaĵis, inter kroatoj ne tre ŝatata Reĝlando Jugoslavio, ankaŭ en Sisak ne estis alia situacio. La armeaj gvidantoj de la disfalanta ŝtato ordonis, ke senkondiĉe oni devas malebligi alvenon de malamika soldataro. La loĝantoj estis mobilizitaj kaj ĉiu ricevis striktan ordonon. Militordono en milita stato ne estas ŝerco.

Grupo de la loĝantoj de Sisak, kiuj devis estris mia avo Nikola Hudeček, ricevis la ordonon, en kazo de atako de la venantaj trupoj, aktivigi minojn instalitajn en la ponto.

Unu sola vorto, nur unu manmovo estus sufiĉa por el la belega ponto, fierajo de la urbo, fari briko-fatrano en la rivero sub ĝi.

La jugoslava armeo retretis, la kroata avancis. Endis do plenumi la ordonon aŭ riski punon pro ĝia neplenumo.

La avo apartenis al neniu politika partio. Li simple estis loĝanto de Sisak. Li observis la ponton kaj pensis: vi ĉiuj venas kaj foriras, kaj ni vivas ĉi tie. Ni bezonas la ponton. Facilas detruigi ĝin, sed penas rekonstrui ... Disiginte la grupon kiun li estris, sekrete li tranĉis la dratojn. La ponton detruis nek li, nek iu ajn alia tion povis fari.

Reveninte hejmen, li nur al la plej proksimaj familianoj konfidis la faritajn.

Pasadis jaroj. Ŝanĝiĝis regantoj, sistemoj, ŝtatoj. Neniu el ili indulgis lin. En Sendependa Ŝtato Kroatio li ne estis privilegiata, ĉar li ne konsentis kun la ideoj de faŝismo, en la komunisma ŝtato li kiel iama riĉulo estis malbontraktita. Ĉion ĉi li stoike





Ada Csiszár

GRANDAJ PERDOJ DE LA MOVADO

*Laŭ Adreas Künzli,
William Harmon kaj
Josip Pleadin*

En la lasta semajnfino de 2007 forpasis en Budapeŝto **ADA CSISZÁR**, ĵurnalistino, esperantistino de 1966. Ŝi naskiĝis en Julivci-Vinogradov (Ukrainio), la 20-an de marto 1930. Pro politikaj kaŭzoj, la familio fuĝis kaj trovis azilon en Hungario, kies ŝtatanato ŝi estis ekde 1975. Sekretario de Esperantlingva Verkista Asocio (1983-1989). Membro de HEA ekde 1966, komitatano (1973-1986) kaj prezidiano (1977-1986). Fakdelegito de UEA ekde 1985. Plej grandajn meritojn en la Esperanto-movado ŝi gajnis por la sindediĉa zorgo pri spirita postlasaĵo de Kolomano Kalocsay. Ŝi kunfondis Kalocsay-memorĉambron de Abaujszanto, iniciatis la Internacian komitatano por honoro al Kolomano Kalocsay (1983) kaj estis prezidantino de la Amika societo de d-ro Kolomano Kalocsay ekde 1991.



Claude Piron

La 22-an de januaro en sia hejmo en Gland (Svislando), pro koratako forpasis **CLAUDE PIRON**, Esperantlingva verkisto, membro de la Akademio de Esperanto kaj honora membo de UEA. Li naskiĝis la 26-an de februaro 1931 en Namur (Belgio). Post studoj en Antverpeno kaj Genevo li estis tradukisto kaj redaktoro-protokolisto ĉe Unuiĝintaj Nacioj en Novjorko (1956-1961) kaj ĉe la Monda Organizo pri Sano diversloke (1961-1969). Ekde 1969 li estis psikoterapiisto, kaj emeritiĝis en 1994. Esperantisto ekde 1942, grave kontribuanta



Don Harlow

al fondo de Esperanto-klubo ĉe UN en Novjorko en 1958. Redaktis la revuon "Svisa Espero" kaj konstante pledis por Esperanto kiel alternativa solvo de lingve komplika situacio en internaciaj organizadoj. Poemverkisto ekde 1950-aj jaroj, kaj fama romanverkisto (sub pseŭdonimo Johán Valano), konata pro la Ĉu-romanserio, kiu komenciĝis per "Ĉu vi kuiras ĉine" (1976). Sekvis aliaj romanoj kaj poemoj: "Malmalice" (1977), "Ili kaptis Elzan" (1985), "Lasu min paroli plu" (1984) kaj la aparte furora "Gerda malaperis" (1983). Speciale gravas lia verko "La bona lingvo" (1989) kaj menciindas ankaŭ franclingva "Le défi des langues" (1994) kaj sonkasedo "Frandu Piron" (1978). Honora membro de UEA (1998), gajninto de premioj Degučić (1994) kaj OSIEK (1998).

La 27-an de januara, pro kancero forpasis en Kalifornia hospitalo **DON HARLOW**, iama prezidanto de Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko kaj redaktoro de "Esperanto USA", konata verkisto, tradukisto, recenzisto kaj antologiisto. Li naskiĝis la 8-an de julio 1942 en Portland (Oregon, Usono). Lernis Esperanton en 1959 kaj praktikis ĝin en Danio kiel interŝanga studento. Studis astronomion en la Universitato de Kalifornio, kaj estis membro de Esperanto-klubo de Los Angeles. Kolektis subskribojn por UNO-peticio en Teksaso, fondis societon en Charleston (Suda Karolino). Dum la armea servo li loĝis en Anglujo por kvin jaroj, kaj estis membro de Londona Klubo. Post la reveno li loĝis en Sakramento kaj fine en Pinole (Kalifornio). Direktoro de la Centra Oficejo de ELNA (1979-1983), ĝia sekretario (1984-1986), prezidanto (1994-1996) kaj redaktoro (1987-1995). Li aranĝis literaturajn paĝojn en la reto, kiuj certe estis inter la plej ofte vizitataj kun 1000-2000 vizitoj tage. Tre multe verkis, tradukis kaj instruis.

eltenis. Promenante laŭborde de Kupa, li gvidis min al la ponto. Li observis ĝin kvazaŭ ĉerpante el ĝi forton por ĉiuj problemoj kiujn li alfrontis. Novaj regantoj povis al li forpreni ĉion krom la sentojn, ke en ĝusta moento li faris bonan aferon. Ali ni, siaj nepoj, li ne povis heredigi bienojn kiujn li posedis, ĉar la regantoj konfiskis ilin, sed li lasis al ni pli multe: sekretojn pri la savita ponto. Ĝi estis ne nur sekreto, sed ankaŭ mesaĝo, ke en plej malfacila tempo oni povas resti homo.

LA MARO - KROATA TREZORO

Kunlabore kun siaj ĉemaraj kaj insulaj filioj, Matica hrvatska organizos de la 23-a ĝis la 25-a de aprilo 2008 en sia palaco en Zagrebo, sciencan simpozion "La maro - kroata trezoro". Inter multaj fakuloj kaj sciencistoj, la 24-an de aprilo prelegos ankaŭ Radenko Milošević pri la temo "Nia maro en Esperanto".

KUNSIDIS PRELEGANTOJ DE ESPERANTO

Kunsido de la prezidantaro de Unuiĝo de Prelegantoj de Esperanto (UPE) okazis la 23-an de februaro en Zagrebo, kaj la kunvenintoj resumis informojn pri Esperanto-kursoj en Kroatio, elektis Viŝnja Branković kaj Jagoda Caldarević Latinović por siaj reprezentantoj en la jarkunveno de KEL kaj akceptis laborplanon por 2008. Menciindas el la laborplano organizado de seminario por instruistoj, la jam tradicia konkurso por lernantoj en Kostrena kaj realigo de retejo de UPE.

JARKUNVENO EN SPLIT

Davor Grgat

Elektinte Anđelko Drnasin por prezidanto, Davor Grgat por vicprezidanto, Etel Zavadlav por sekretariino, Ivo Puharić kaj Marin Bedalov por anoj de la Estrara komitato, en Split okazis la 22-an de februaro jarkunveno de Esperanto societo "Split", kiu kunvenigis siajn membrojn el la urbo mem, el la regiono de Kaštela kaj el proksimaj urboj (Solin, Sinj, Dugi Rat, Makarska) kaj insuloj (Brač kaj Hvar). El la raporto pri pasinta laboro, kiun prezentis Davor Grgat, antaŭa prezidanto, interalie estis konstatite, ke la Societo longteme ne havis propran ejon. Ĝi ofte kunvenadis en kinejo aŭ kafejoj. Kvankam estis senditaj pluraj petskribojn al lokaj komunumoj kaj al la urba magistrato, nome al ĝia kulturfako, ĉio restis senrezulta. Dank' al sia konateco kun d-ro Ljubo Urlić, vicurbestro de Split, kiu akceptis Esperanto-delegacion (Grgat, Dimitrijević kaj Drnasin), la 16-a de marto 2005, la esperantistoj el Split ricevis propran ejon. Ekde tiam, ĉiun merkredon kaj vendredon inter la 18h00 kaj la 20h00 la ejo (en la Urba komunumo Lovret, Gundulićstrato n-ro 11, en la urbocentro), estis rezervita por esperantistoj. Tuj komenciĝis Esperanto-kurso kiun gvidis s-ano Dimitrijević, kaj sukcese finis ĝin Jasmina Cević kaj Ana Luketin, kiuj kune kun Ivo Puharić, Dinko Matković, Antica kaj Davor Grgat, partoprenis la 7-an kongreson de kroataj esperantistoj en Zabok. Krom la kursoj (kiujn gvidis s-ano Dimitrijević), en la societo tamen ne aperis interesitoj pri aliaj aktivecoj krom la kunvenoj, kaj eĉ ili estis nombrebaj per fingroj



de unu mano. Ofte en la kunvenoj mankis kvorumo. Grgat en sia raporto ne povis preterlasi, ke dum pasintaj 4 jarojn, forpasis tri tre gravaj personoj: prof. Tomislav Grčić, pastro Krešimir Janković kaj prof. Ivan Tomašević. Gloron al ili! Dum certa tempo m-gro Ivo Osibov, estis sekretario de UEA, kaj klelkaj societanoj partoprenis Universalajn Kongresojn de Esperanto en Gotenburgo, Vilno kaj Florenco. Samkiel estis akceptita laborraporto de Grgat unuvoĉe, samtiel estis akceptita financa raporto de s-ano Dimitrijević. La jarkunveno elektis Kontrolan komitaton kun jena konsisto: Mira Kocjančić, Marijan Cević kaj Lidija Leskur. Akceptita estis ankaŭ laborplano por estonta laboro, kaj elektitaj delegitoj por jarkunveno de Kroata Esperanto-Ligo (Anđelko Drnasin kaj Etel Zavadlav). Unu el la plej gravaj decidoj por estonta laboro estas organizado de porkomercantaj kursoj, kaj reklamado de Esperanto en lernejoj. Ĉiunonate la lastan vendredon okazos membrakunvenoj en la societejo. Du pliaj decidoj estas akceptitaj: la Societo donacos 2.000 kunaajn kiel helpon por eldono de vortaro de s-ino Lucija Borčić, kaj 2.000 kunaajn por helpo al Kroata Esperanto-Ligo por ĝia sidejo en Vodnikova 9.

ESPERANTISTOJ EN LA RIJEKA KARNAVALO

Meze de februaro ĉiujare en Rijeka okazas unu el la plej konataj karnavaloj en Kroatio. Ĉi-jare, la 3-an de februaro en la karnavala parado partoprenis pli ol 9.000 partoprenintoj kaj ĝi daŭris pli ol ses horojn kun 50.000 spektantoj. En la karnavala parado partoprenis jam tradicie ankaŭ Esperanto-societo Rijeka kun "Esperanto-maskerada kompanio Paždroc" (=tohuvaĵo). La ĉi-jara karnavala nomo de la kompanio estis "Giardin" /parto de Rijeka en la loka dialekto de itala minoritato) kaj ĝin konsistigis 30 maskoj kun alegoria veturilo en formo de 5-metra akvumilo. Bona reklamo por Esperanto, ĉar la nomo de Esperanto estis ripetata ĉe ĉiu kontrolpunkto kaj en la televida programo. Sekvontjare la rijekaj esperantistoj intencas inviti ankaŭ esperantistojn el eksterlando por pligrandigi la grupon. Interesitoj do bonvolu kontakti Esperanto-societon, Blaža Polića 2, HR-51000 Rijeka, Kroatio, aŭ rete: esperanto.rijeka@ri.htnet.hr.

Laŭ la teksto de Vjekoslav Morankić



SUB LA VERDA BLUZO BATU HOMA KORO

✍ Josip Pleadin

Gbeglo Koffi: SUB LA VERDA BLUZO
Eldonis: Afrika Centro Esperantista, Lomé,
Togolando, 2007. Formato: A5. Amplekso:
86 paĝoj. Prezo: 16,50 eŭroj (+ 3,00 eŭroj
afranko).

Se oni enpensigas provante el sia memoro eltiri nomojn de afrikaj esperantistoj, supozeble, eĉ tre certe, oni troviĝos antaŭ granda embaraso. Ĉe la vorto "Afriko", en mia kapo ĉiam ŝvebas nur la nomoj de Kola Ayaji kaj Gbeglo Koffi. Dum Kola Ayaji estis joruba negro, cetero civitano de Britio, Gbeglo Koffi estas indiĝena togolandano. Estas nenecese menci, ke afrikanoj en la Esperanto-Movado malmultas ĉefe pro sia malriĉeco. Multaj esperantistoj havis malagrablajn spertojn pri monpetado de afrikanoj, kiuj jen aperis en Esperantujo, kaj jen subite malaperis. Eŭropaj esperantistoj multfoje ŝajne indiferentas pri la afrika kontinento kaj semantoj de Esperanto-ideo en tiu mondoparto estas pli esceptoj ol kutimaĵo. De tempo al tempo iu faras mision en Afriko aŭ sporade aperigas eldonon de lernilo en iu el afrikaj lingvoj.

Tute alispeca estas la agado de nederlandano Hans Bakker, dank' al kies multjara persista agado inter afrikanoj, nuntempe ni havas movad(et)ojn kaj izolitajn esperantistojn en diversaj anguloj de la "nigra kontinento".

La libro "Sub la verda bluzo", kiu atingis nian redakcion, estas grandparte omaĝita al lia laboro. Ĝi estas kvazaŭ naskiĝtaga donaco okaze de lia 70-jariĝo (la 8-an de novembro).


La teksto ĉe la unua vido ne aspektas alloga, dum la legado ĝi povas esti monotona kaj sensuka, sed se oni enprofundiĝas en la legadon, montriĝas unu el nebrilaj epizodoj de la Esperanto-movado. Temas pri konflikto inter UEA kaj afrikaj esperantistoj (mi kuraĝus diri: inter gvidantoj de UEA kaj la libroaŭtoro mem). Pri tiu konflikto, kiu daŭras jam kelkajn jarojn, la flankaj observantoj ne povis prave juĝi, ĉar legi multajn kverelojn kaj mesaĝojn, riproĉojn kaj kalumniojn, neniel kongruas kun idealisma esperantismo, movado de paca kunekzistado, homama kaj amikeco. Tamen, gravas



Gbeglo Koffi,
la aŭtoro

atentigi pri la reago de la ĉefa rolulo de tiu ĉi libro - Hans Bakker mem, kiu post la Jokohama UK, rezigne kaj proteste retiriĝis el la afrika agado. Kvankam li reagis ankaŭ pli frue "kiam li notas la maljustaĵojn de UEA-gvidantoj" (citaĵo el la libro!), lia publika letero de la 10-a de aŭgusto 2007, sendita al Renato Corsetti kun la peto perigi ĝin al la komitatoj de UEA, estas la ĉefa punkto de tiu ĉi libro. Eble represo de la menciita letero ne plaĉus al la gvidantoj de UEA, kiu kulpigus ankaŭ min pri civitismo, do mi rezignas pri tia ago. Tamen, tro oftas skuoj kaj mistraktoj de UEA-membroj kaj Esperantaj aktivuloj, kio ege kortuŝas min. Mi mem iamaniere retrorigardas

al la zagreba UK, aŭ eĉ al la hamburga. Per interreto ĉiu flustro aŭskulteblas en foraj mondopartoj kaj imagigas skandalemon de la nuntempa Esperantujo. Estas memkompreneble, ke ĉiuj sistemoj funkcias surbaze de grupa superrego aŭ lobia aktivado, sed oni devas rekonii bonintencan agadon. Gbeglo Koffi, kiu antaŭe estis prezentita kiel rara reprezentanto de Afriko en la komitato de UEA, ne povas esti simple forigita el la scenejo. En malfacilaj cirkonstancoj en kiaj agadas li kaj aliaj afrikanoj, estas bezonata forta konvinko, ke ili faras ion valoran kaj utilan. En "Sub la verda bluzo" Koffi prezentas sian konvinkon pri unu sola Esperantujo kun multaj siaj interfluo. Ĝuste pro tio, ĉar mi dividus lian opinion, mi ne povas akuzi lin pri kontraŭ-esperantismo. Se lia koncepto malkongruas kun la koncepto de aliaj samideanoj, ĉu ne indus refreŝigi la memoron pri Zamenhof kaj lia vivo kaj agado.



REMEMOROJ PRI NATURAMIKOJ KAJ ESPERANTISTOJ

Omaĝe al Max Finkenzeller el Vieno (Aŭstrio), membro de Esperantistaj Naturamikoj, kiu forpasis 102-jara

 Radenko Milošević

Kun Max Finkenzeller mi interkonatiĝis en 1962, ĉeestinte en Vieno, kiel reprezentanto de zagrebaj naturamikoj - esperantistoj kunvenon de naturamikoj - esperantistoj el eŭropaj landoj.

Rememoroj pri tiu tempo komenciĝas per t.n. "terena unuo" de junulara grupo de Kroatia Ruĝa Kruco kiu aliĝis al Montgrimpa societo "Naturamiko" en Zagrebo. La rememoroj apartenas al grupo de feliĉaj junaj gelernantoj kaj gestudentoj en 1960-aj jaroj. Ili komune aliĝis al "Naturamiko", kaj la plej granda parto el ili aliĝis al ĝia "Altmonta sekcio". La Societo estis membro de Kroatia Montgrimpa Unuiĝo kaj samtempe ankaŭ de Naturamika Federacio - internacia unuiĝo de montgrimpantoj kaj esperantistoj, kies centro troviĝis en Vieno. Montgrimpa societoj, naturamikoj kaj grupoj de TANEF - Tutmonda Asocio de Naturamiko - Esperanto-Fako, estis troveblaj sur ĉiuj kontinentoj.

La grupanoj apartenis al juna generacio, leginta la romanojn pri Winnetou, verkitajn de Karl May. Stariĝas la demando: kia interrilato ekzistas inter la nobla indiana tribestro Winnetou kaj Esperanto? Tiu generacio de nuntempaj sesdekjaruloj lernis pri kompasoj kaj geografiaj mapoj, pri unua helpo kaj orientiĝo en montaroj. Leginte la romanojn pri Winnetou, lia sango-frato kaj amiko Old Shatterhand kaj aliaj bravuloj, ili akiradis unuajn sciojn pri bonaj kaj noblaj homoj senkonsidere la haŭtkoloron,

raŝon aŭ naciecon. Temis pri romanoj kies ĉefroluloj estis homoj ĉiam batalintaj kontraŭ malbono, ne mortigante malicajn kontraŭulojn eĉ kiam tio ŝajnus necesa. Tia kondukmaniero kaj vivreguloj, bedaŭrinde, rezultis per multfojaj embarasoj al bonaj kaj bravaj homoj, pro kio mem pereis ankaŭ ilia idolo Winnetou.

La membroj de la societo "kuraĝis" partopreni la ĉampionecon de Kroatio en alpaj ski-disciplinoj. Ĉe la starto de slaloma vetkuro ekis ekscitiĝo de partoprenintoj, ĉar la membroj de la skiteamo de "Naturamiko" aperis ĉe la skideklivo en t.n. "pump-pantalonoj" kaj simplaj montgrimpoj ŝuoj havante skibastonojn kun pratempaj grandegaj diskoj ĉe la suba parto.

Ili tre sukcese partoprenadis en orientiĝaj konkuroj en virinaj kaj viraj disciplinoj, akirante eĉ la unuajn postenojn kaj partoprenante en internaciaj ĉampionecoj. Ne ekzistis monto aŭ montaro en la eksa ŝtato, kiun ili ne konkeris. Foje ili eĉ aventuris per pneŭmatika boato ekde la lago de Jablanica, laŭ la rivero Neretva ĝis la urbo Mostar. Post kelkaj faloj trans la akvofalojn de Neretva - ili ne plu volis riski.

Ili partoprenis ankaŭ en vintraj kaj alpaj marŝadoj enlande kaj en multaj najbaraj landoj, multfoje eĉ kiel diversdisciplinaj instruistoj.

Ilia kanto kaj dancado estis konataj ĉie, ne nur inter la zagrebaj montgrimpantoj, kaj ne nur en la montara domo "Glavica" ĉe la okcidenta parto de Medvednica.

Nepre menciindas,



ke ili ne estis nur alpinistoj, speleologoj, skiantoj, sed grandparte ili estis ankaŭ esperantistoj. Almenaŭ ĝis la nivelo de baza kurso.

Specialaĵo de iliaj sabataj ekskursoj, krom kartludado, kanto kaj dancado estis okazintaĵoj kiuj siamaniere povus rememorigi vin pri "Dekamerono" de Bocaccio, en kiu cent novelojn dum dek tagoj rakontas sep virinoj kaj tri junuloj. Dum semajnfinaj komunaj montmigradoj, ĉiam unu el la grupo estis taskigita trovi tekston, rakonton aŭ ĉapitron el iu libro, kiun poste ili legadis ŝercante kaj vortludante. La ekzemplaj estis: "Taglibro de Adamo kaj Eva" de Mark Twain (en kiu videblas kiel diference la mondon vidas kaj taksas virinoj kaj viroj), "Anĝelaro" de Robert Penn Warren (pri diversspecaj amoj), parto el poemkolekto "Herbospiko" de Walt Whitman nomata "La ŝtato" ktp. Pri sendependa ŝtato oni ĉiam sonĝis, revadis kaj kantis: jen la malpermesitan kanton pri la banuso Jelačić, jen "Feinon de Velebit". Ili estis fundamenta por cerbumado pri ebleco kaj realeco de "Ŝtato suna" de Thomasso Campanella.

Iun sabaton iu alportis "La dian komedion" de Dante. Mirigitaj oni aŭskultis la parton kiu mencias Kroation. Aliajn fojon grandegan sukceson akiris legado de la poemo de Dragutin Domjanić "Sur Dolac" el la jaro 1933, kiu respegulis situacion de nia Zagrebo: "Alvenis homoj da kor' neniom havinte / por

nia Zagrebo maljuna / ĉion
ruiniginte kaj ĉion dismetinte
/ kvazaŭ plago tataara kaj huna.
/ Kampojn kaj ostojn eltiris
fose / kaj en la fundo marĉa
dum bruo/ betonis strangajon
ili kolose / ĉu bierejon aŭ
tombotruon?" (traduko de J.
Pleadin)

Post tempopaso
la societo kaj ĝiaj membroj
laciĝis, maljuniĝis kaj fine
disiĝis! Venis la tempo, ke ili
lernu kaj studu pli-malpli. Ili
finlernis kaj finstudis. Kaj ili
edziĝis kaj fondis familiojn!
Ili disiĝis ĉiudirekten, ne nur
tra Eŭropo, sed de la norda ĝis
suda polusoj. Multaj jam estas
pensitaj oficiroj de Kroatia
Armeo aŭ akademianoj.
Iuj provis kunorganizi
negocadon, entreprenojn,
sed ĉio finiĝis samkiel en
la fama rakontokolekto de
John Steonbeck "Pri homoj
kaj musoj": oni konsentis kun
iu homo kaptadi ranojn kaj
popece ricevadi monon. Ho
ve, post ricevita antaŭpago ili
trinketis, poste drinkegis kaj
ekdormis! Kaj la ranoj unu
post la alia – fuĝis!

Ili ne plu skias sur
la "granda skiejo" de Cmrok,
nek sur Bažulovka el pinto
de Medvednica ĝis Placo
de banuso Jelačić. Ili ne
glitkuradas el Prekrižje ĝis la
fundo de Zelengaj. Ja, la gefiloj
jam grandas kaj aĝas, kaj la
genepoj ankaŭ kreskas jam.

Proverbo: "Multajn
amikecojn detruis longtempa
sileto kaj nekontakto." Ĝi ne
rilatas la iamajn amikojn
- Naturamikojn. Konfirmas la
aserton, ke amikoj ja estas tiuj,
kiuj post longa foresto, tamen
povas daŭrigi la konverscion,
kvazaŭ hieraŭ interrompitan.
La aserto certas, ĉar en tiujn
amikecojn estis enmasonitaj
multegaj brikoj da kunvivadoj
kaj travivaĵoj, kiujn neniam
tempofluo povus forviŝi!

64.000 EŬROJ POR ESPERANTA TRADUK-PROJEKTO

La Eŭropa Komisiono aprobis tradukprojekton de infanlibroj, en kiu Esperanto rolos kiel pontolingvo, raportis Zlatko Tišljar en "Libera Folio". Laŭ tiu fonto, EU financoj per 64.000 eŭroj la projekton, en kiu infanlibroj pere de Esperanto estos tradukitaj inter la bengala, itala, slovena kaj kroata lingvoj, kaj poste ditribuitaj en elementaj lernejoj. La eldonprojekton ideo daŭrigas la pontolingvan tradukadon de porinfanaj verkoj, pri kio Kroata Esperanto-Ligo havas jam longan tradicion, speciale akiritan per traduko de "Mirindaj aventuroj de Metilernanto Hlapić" (ricevinta premion "Infanlibro de la Jaro"). En la projekto, laŭplane, partoprenos Edistudio el Pisa, Inter-kulturo el Mariboj kaj barata eldonasocio Samatat Prakashan el Kolkato. La projekto devus realiĝi en la periodo 2008-2010.

Kvankam lanĉita tre optimisme sub la titolo "Hindia infanlibro en tri eŭropaj landoj - tri eŭropaj infanlibroj en Hinda Unio", la projekto ne tiel facile realiĝos, ĉar Eŭropa Komisiono postulis severan rekreadon de la projekto, laŭ difinitaj reguloj. La definitiva decido de Eŭropa Komisiono estos konata en sekvaj semajnoj.

En la unua aperjaro, nia redakcio disponigis certan kvanton da senpagaj abonon al nepagipovaj esperantistoj. Ekde 2008 estas malfermita aparta

ABONHELPA FONDUSO

al kiu ĉiu esperantisto, leganto aŭ abonanto, povas donaci certan sumon. El la kolektita sumo estos pagataj abonon por nepagipovaj esperantistoj, ĉefe en landoj de Afriko kaj Azio. La pagojn bonvolu direkti al nia konto ĉe UEA: **plea-k** (kun mencio: "Abonhelpa fonduso"), aŭ enlande rekte al nia redakcio per poŝtmandato aŭ pagante al ĝirkonto de la eldonanto (vidu la paĝon 2).

Saldo

47. Ivo Puharić (Makarska)	13,61 eŭroj
48. Anka Špehar-Šantolić (Zagreb)	6,80 eŭroj
49. Melanija Grgić (Zagreb)	6,80 eŭroj
50. Lina Gabrielli (Italio)	15,00 eŭroj
51. Ljubica Sedmak (Pomer)	3,17 eŭroj
52. Dušan Adnad (Borovo)	5,10 eŭroj
53. Zdenka Polašek (Bjelovar)	6,80 eŭroj
54. Olga Srkoč (Zagreb)	6,80 eŭroj
55. Boris Čović (Zagreb)	17,01 eŭroj

Ĝis nun kolektitaj:

448,99 eŭroj

Dankon al ĉiuj ĝisnunaj donacintoj.

BARACK OBAMA REKLAMATA EN ESPERANTO

Kandidato por usona prezidanto Barack Obama estas reklamata en Esperanto ĉe la multlingva film-retejo dot.SUB.com. La originala anglalingva filmo estas tradukita en diversajn lingvoj, inter kiuj troviĝas ankaŭ Esperanto. Krom tiu filmo, en la retejo troveblas kvindeko da aliaj filmoj, el kiuj dudeko estas originale en Esperanto. La filmo pri Obama estas 4-minuta, la Esperanta tradukoe stas bonkvalita, sed unu el la ĉefaj aktivuloj de la retejo, Chuck Smith, ne povis diri, kiu tradukis la filmon.



BARLASTONO SUB MINACO DE FERMIĜO

La kolegio Wedgwood Memorial College en Barlastono (Britio), kie okazis Esperanto-kursoj dum jardekoj, kaj sur kies tereno troviĝas Esperanto-Domo kun la Biblioteko Butler kaj la oficejo de la landa Esperanto-asocio, estas sub minaco de fermiĝo. Tion povis aŭdi la legantoj de diversaj Esperantaj gazetoj kaj retejoj. La redakcio de "Zagreba Esperantisto" sendis individuan demandon al unu el konataj britaj esperantistoj, kiuj komentis jene: "Vere mi ne sentas min kapabla verki publikigeblan artikolon pri tio ĉi, ne pro ia konfidenceco sed simple ĉar la afero estas tre nebula. Unue oni devas kompreni, ke per la vorto "Barlastono" oni parolas ne pri la Esperanto-Centro, sed pri la kolegio en kies kampuso staras la Esperanto-Domo. EABritio havas centjaran posedon de la Esperanto-Domo, kiu estas memstara aparta konstruaĵo staranta en la tereno de la altlernejo Wedgwood en la vilaĝo Barlaston. Tiu lernejo estas ĝenerala studejo por ĉiaj adoltoj; karakterizaĵo estas, ke la homoj povas ne nur studi sed ankaŭ tranokti tie, tiel ke oni povas

oportune sekvi plurtagan kurson. De jaroj la Kolegio havas deficiton. Tio per si mem ne estas nekutima ĉe tiaj klerigaj instancoj, sed ŝajne allogas la posedantan instancon la konsidero, ke la Kolegio okupas du grandajn kaj tre valorajn domojn, kiuj mem staras en tre vasta tereno. La domoj povus fariĝi luksa(j) hotelo(j) kaj en la bieno estus loko por konstrui plurajn loĝdomojn. Iam la kolegiestro estis Derek Taton, esperantisto, kiu tamen pensiigis antaŭ pluraj jaroj. Lin anstataŭis alispeca kolegiestro kun prioritatoj pli administraj ol klerigaj. Tiu lasta iom subite foriris antaŭ eble unu jaro, kaj ŝin oni ne anstataŭigis. Do nun regas necerto pri la estonta sorto de la Kolegio. Ĉio ĉi rilatas al EAB tiusence, ke nia domo staras en la bieno de la Kolegio, kaj ankaŭ tiusence, ke la Kolegio estas tre bona ejo por niaj kursoj k. a. eventoj. La Esperanto-domo mem havas tri proprajn dormoĉambrojn, kaj la biblioteka ĉambro taŭgas por kunsidoj. Sed ne eblas - ekzemple - prepari manĝojn (niaj homoj manĝas en la Kolegio). Do entute la Esperanto-Domo apenaŭ taŭgas por okazigo de Esperanto-eventoj, kursoj, k.s. Tamen se la kolegio fermiĝus nek la posedo de la Esperanto-Domo nek la funkciado de EABritio estus minacata. Ankaŭ la biblioteko povus tute normale funkcii. Ni devus tamen trovi alian lokon (eble en la vilaĝo mem, eble en apuda urbo) por niaj kursoj kaj eventoj. Povas esti, ke, se oni vendus la kolegijajn domojn, nova posedanto volus, ke foriru ankaŭ EAB; sed tiukaze necesus pagi al ni grandan kompenson, kiu sufiĉu por akiri

novan ejon. Nia kontrakto validas ja ĝis la jaro 2100. Do sume la situacio estas jes maltrankviliga, tamen ne jam katastrofa, kaj ĉefe - tre malklara!".



PRI KELKAJ GAZETOJ

"Pola Esperantisto" ĉesis aperi en 1989 kun la krizo de la landa movado, sed revivigis ĝin la sendependa eldonejo "Hejmo" posedata de Kazimierz Leja. Komence de 2008 la nova estraro de Pola Esperanto-Asocio transprenis la respondecon pri la revuo, sed siaflanke Kazimierz Leja informis, ke lia eldonejo ne plu okupiĝos pri la gazeto. Sekve de tio UEA anoncis en la decembra numero de "Esperanto", ke la gazeto ĉesas aperi kaj ne plu estos abonebla pere de la abonservo de UEA. Reagis protestletere al UEA Halina Komar, la prezidanto de PEA, kiu konfirmas, ke "Pola Esperantisto" daŭre aperos, sed ankoraŭ ne estas konataj detaloj. Intertempe la eldonejo "Hejme" komencis eldonadi la revuon "Spegulo", redaktitan de Tomasz Chmielik. Iom pli detalan observon pri "Spegulo" ni prezentos en la maja numero de nia gazeto. La redaktoro Tomasz Chmielik pri "Spegulo" diras, ke ĝi ne volas konkurenci, sed kompletigi. Nome, post malapero de la konata literatura revuo "Fonto" (Brazilo), kaj apero de "Beletra Almanako" (Usono), tamen restas breĉo en tiu gazetbranĉo. Kvankam reapero de "Fonto" estis anoncita en 2008, ĉar onidire ĝi trovis mecenaton, la iama eldonisto Gersi Alfredo Bays refutis la informon.





Laŭ informo de Litova Esperanto-Asocio, Tutmonda kongreso de esperantistoj-jurnalistoj okazos de la 26-a ĝis la 30-a de majo ĉi-jare en Vilnius, en la malnova urbodomo. La ĉeftemo diskutota estos "Internacia interkultura komunikado: ĵurnalismo kaj Esperanto". Pro la subvencioj de la litova registaro kaj

KONGRESO DE ESPERANTISTOJ ĴURNALISTOJ EN LITOVIO

la urbestro de la ĉefurbo Vilnius, la partopreno, loĝado kaj manĝado de la partoprenantoj estos senpaga. Al la kongreso estas invitataj ĉiuj nunaj kaj iamaj membroj de TEJA (Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio), ĉiuj aliaj profesiaj kaj praktikantaj ĵurnalistoj kaj apudaj profesioj iel rilataj al ĵurnalismo (fotistoj, literaturistoj ktp.). Krome, partoprenos la Kongreson ĉiuj estraranoj de UEA kaj ties ĝenerala direktoro. La registarajn subvenciojn por la esperantista aranĝo oni sukcesis ricevi kunlabore kun la Litova Ĵurnalista Asocio, ĉefe pro tio ĉar Esperanto en Litovo havas bonan reputacion kaj prestiĝon. La aranĝon partoprenos ankaŭ kelkaj

neesperantistaj litovaj ĵurnalistoj por kontakti kun siaj esperantistaj kolegoj.

Laŭ la retpaĝo de Litova Esperanto-Asocio, kiu pri la kongrespreparoj meze de marto skribas detale, partoprenos ĉirkaŭ 120 personoj el trideko da landoj: Aŭstralio, Barato, Belgio, Brazilo, Bulgario, Ĉeĥio, Ĉinio, Danio, Finnlando, Francio, Germanio, Hungario, Irlando, Italio, Koreio, Kroatio, Kubo, Latvio, Litovio, Luksemburgio, Nederlando, Pakistano, Pollando, Portugalio, Rusio, Serbio, Slovakio, Svedio, Svislando, Ukrainio, Usono). Ĉefpreleganto pri la kongresa temo kaj ties reĝisoro konsentis esti prof. Humphrey Tonkin el Usono.

FILATELAJ EKSPOZICIOJ

Laŭ Nikola Turk

Okaze de la centjariĝo de Esperanto, en Kroatio, en Zagrebo okazos du aŭ tri filatelaj ekspozicioj. La unua okazos en majo kaj en junio en la koncertejo "Lisinski" en kadre de granda ekspozicio okaze de la 15-jara jubileo de Kroata Filatelista Asocio, kaj aliaj du en novembro kaj decembro en Starogradska vijećnica, respektive en la librovendejo "Školska knjiga". Ekspoziciis prof. Nikola Turk, Marijan Šegedin, Ljubimko Šapurić kaj Josip Pleadin. Inter la plej valoraj ekspozicioj troviĝas la jugoslaviaj poŝtmarkoj el 1953 kaj la kroaciaj el 1997 kaj 2001.



BJALISTOKAJ PREPAROJ

La urbo Bjalistoko decidis proprakoste renovigi historian konstruaĵon ĉe la strato Warszawska 15 kaj destini ĝin por la sidejo de Esperanto-Centro kiu portos la nomon de Zamenhof. Laŭ lanĉita informo, ĝi devus inaŭgurita la 25-an de julio 2009 okaze de la UK. En la buĝeto de la komunumo por 2007 estas fiksita sumo por la rekonstruado. La Esperanto-Centro havos proksimume 700 kvadratajn metrojn, kaj konsistos el muzeo pri Zamenhof, eduka kaj kultura centro, kaj centro pri esploroj de kultura kaj lingva komunikado. Jure ĝi estos urba institucio kaj ĝi daŭre ricevos rimedojn el la urba buĝeto. Por la jaro 2008 ĝi ricevos proksimume 400.000 eŭrojn. Intertempe, la 1-an de januaro, estis subskribita ankaŭ kontrakto inter la urbo Bjalistoko kaj la teamo E@I, respektive kun ĝia kunordiganto Peter Baláz pri alia projekto. Nome, en septembro 2008 ĉirkaŭ 400.000 legantoj de la prestiĝa pola tutlanda ĵurnalo "Gazeta Wyborcza" ricevos ankaŭ kompaktdiskon kun kurso de Esperanto kaj ampleksa prezento de la Esperanto-movado. La eldono estos parto de granda informakampanjo pri Esperanto, iniciatita de la urbo Bjalistoko lige kun la UK okazanta en 2009. Tiu kampanjo komenciĝis jam decembre 2007, kiam Louis-Christophe Zaleski-Zamenhof, nepo de Ludoviko Zamenhof, estis deklarita honora civitano de Bjalistoko. La plej intensa kampanjo okazos julio 2008 kun diversaj surstrataj aranĝoj: eventoj, renkontiĝoj, afiŝoj kaj afiŝegoj, tendo de toleremo sur la urba placo ktp. La anoncita kompaktdisko estos kulmino de la kampanjo septembre.

KOMUNA EŬROPA REFERENCKADRO PRI LINGVOEKZAMENADO

En januaro 2007, post kunalboro inter la Konsilio de Eŭropo, UEA, la reta iniciato edukado.net kaj ILEI, aperis broŝuro "La Komuna Eŭropa Referenckadro - pri instruaj kaj taksaj metodoj por la akiro de modernaj lingvoj". La apero de tiu broŝuro per si mem estas sukceso, des pli ke samtempe la Lingva Departemento de la Konsilio de Eŭropo en Strasburgo donis permeson por la Esperantigo de sia ĉefa dokumento pri la temo. La Esperanta 262-paĝa dokumento aperis kaj estas listigita inter la nacilingvaj versioj en la retejo de la Konsilio de Eŭropo. Unuaj lingvoekzamenoj de ILEI-UEA laŭ la komuna eŭropa normaro estas atendeblaj en la dua duono de 2008.



LINGVA DIVERSECO EN EŬROPO

La Eŭropa Komisiono komisiis al la "Grupo de Intelektuloj por Interkultura Dialogo", estrata de Amin Maalouf, raportoj pri la temo "Kiel lingva diverseco povus fortigi Eŭropon", kaj esplori pri la ligoj inter lingva diverseco kaj Eŭrop-unia identeco. La 30-paĝa raporto, atente tralegita de Aleks Kadar, estas "apenaŭ progresiga laŭ lingvopolitika kaj lingvodemokratia vidpunkto". Unu el ĝiaj ĉefaj ideoj estas, ke en ĉiuj EU-landoj devus esti fluaĵ parolantoj de ĉiuj EU-lingvoj, kaj ke rilatoj inter ajnaj du landoj devus baziĝi sur la lingvoj de



tiuj du landoj, ne sur ajna komuna pontolingvo. Samtempe la raporto klare akceptas kiel elirpunkton la rolon de la angla ĝuste kiel tia pontolingvo. Tia raporto koincidas kun la starpunkto de Leonard

Orban, la ano de la Eŭropa Komisiono kun respondec pri multlingveco, laŭ kiu ekzistas pluraj motivoj pro kiuj Esperanto ne povas iĝi pontolingvo en Eŭropa Unio. Unuflanke li atentigas, ke kreado de kompletaj terminaroj por tute novaj uzokampoj de Esperanto estus enorma, multekosta laboro. Aliflanke, li asertas, ke ekesto de pontolingvoj estas "historie spontata fenomeno sociolingvistika, ne rezulto de decidoj leĝofaraj kaj politikaj. Samtempe, li mem ne kredas je pontolingvoj, sed ne komentas la ĉiam kreskantan rolon de la angla en tia rolo en Eŭropa

HRVOJE ŠERCAR: *Radenko Milošević* Kvindekjara retrospektivo (1958 – 2008)

La 17-an de februaro estis malfermita ekspozicio "Kvindekjara retrospektivo" de la pentristo Hrvoje Šercar, "nia esperantista pentristo"! Plurfoje li donadis al ni siajn pentraĵojn, kaj laste li desegnis la jubilean afiŝon pasintjare.

Lia kunlaboro kun zagrebaj esperantisto komenciĝis en la jaro 1989, kiam li kaj aliaj invititaj kroataj artistoj (Tahir Mujičić, Franci Blašković kaj Milan Rakovac), kun ambaŭ redaktoroj de "Zagreba Esperantisto" kaj kun proksimume aliaj cent kroataj esperantistoj duaŭtobuse karavanis al Bolonjo. (Bedaŭrinde, lastmomente malfruis s-ro Rakovac kaj s-ro Blašković forvadis ie en Padovo.) La karavno estis organizita por ke zagrebaj esperantistoj transprenu la oran medalon de la bolonja urbestro pro la kunlaboro kun Esperanto-grupo "Achille Telini" el Bolonjo. La ceremonio okazis en la beleĝa salono de la Palaco Accursio far' la vicurbestro Eugeno Riccomini.



La invitulo de la ekspozicio de s-ro Šercar frontpaĝe havas desegnaĵon karakterizitan por lia pentrado kaj arta esprimo. Post mafermaj paroladoj kaj gratuloj komenciĝis interparolo kaj revivigo de belaj rememoroj pri la bolonja vojaĝo, kiam ni kune ĝuis bongustan vinon en altplafona malnova kastelo, kie parto da esperantistoj tranoktis. Ni rememoris ankaŭ pri malsukcesinta ekspozicio en Bolonjo, por kiu la bolonjaj esperantistoj ne sukcesis trovi konvenan ejon. Anstataŭ en iu oficiala galerio, ĝi okazis vespere, neoficiale en la salonego de la jam menciita kastelo. La pentraĵoj estis ekspoziciitaj surplanke, kaj la spektantoj trinkintaj vinon dancadis inter ili, "longe dum nokt', dum vina longa nokt' " ĝis la kvara matene, kiam la vino estis fortrinkita kaj la pentristo, la jurianoj kaj la publiko, lacaj enlitiĝis.





Post longa tempo jen venis momento, ke mi ion diru al vi - amike, malkaŝe ... tute sincere! Mi vidas, ke vi kreis novan gazeton (de esperantistoj zagrebaj), kiu ĉiuflanke superas la gazeton de Kroata Esperanto-Ligo ("Tempo"), eĉ 10-oble, 100-oble, sed, ho ve! Mi petegas vin: unuiĝu! Unuiĝu sub nova titolo "Kroata Esperantisto" (kaj nova abonkosto!). Tiam flugante mi rapidos fariĝi ĝia abonanto. Ĝis tiam mi restas tro malĝoja.

Tomo Plačković (Podgarić)

Bonege min atingis du belaj revunumeroj de "Zagreba Esperantisto". Mi talegis la numerojn, kaj taksas la revuon tre bona. La revuo "Zagreba Esperantisto" estas verŝajne pli interesa kaj diversstema ol nia "Litova Stelo". Mi gratulas vian aktivecon, energion kaj deziras al vi trovi novajn, interesajn temojn por "Zagreba Esperantisto". Akompanu vin sukceso.

Laimute Cīrvinskiene (Pasvalys, Litovio)

Mi petas vin, se eble, publikigu ion pri mia (t.e. nia) Esperanto-Domo. "Zagreba Esperantisto" estas bonega, kaj mi miras kie vi trovas informojn, kaj kiel vi sukcesas ilin aranĝi tiel eŭropece. Gratulojn! Mi legis la tekston pri la vortaro de Lucija Borčić. Kial ĉe ŝi "puŝŝipo" estas tradukita kiel "tegljaĉ, se ĝi "tiras"? Mi estis maristo kaj iomete komprenas la temon. Ĉu en la vortaro ekzistas "ŝipmodelo" aŭ "modelŝipo"?

Drago Smolić (Paderborn, Germanio)

Mi rimarkis glagolican titolon "Zagreba Esperantisto" sur la frontpaĝo de la numero 1/2008, kaj mi volas rakonti al vi iomete pri glagolicaj literoj. Juna virino, lernantino de Belarta mezlernejo, posedas orajistejon en urbeto Svetvinĉent, 30 kilometrojn norde de urbo Pula. Ŝi vendas orajn kaj arĝentajn alpendaĵojn-monogramojn, kaj aliajn ornamaĵojn produktitajn en formo de glagolicaj literoj. La ideon ŝi patentigis kaj ricevis premiojn. Se vi vojaĝos tra Istrio, eble vi haltu por duonhora en Svetvinĉent. En la urbocentro troviĝas malnova fontakajo, kaj ĉio respiras per antikva tempo.

Ljubica Sedmak (Pomer)

Mi gratulas pro la plej bela Esperanto-revuo en la mondo kaj bondeziras pluan sukceson. Kore,
Boris Ĉović (Zagreb)

Amiko-neesperantisto informis nin, ke en la urba tombejo de Križevci ekzistas tombo de esperantisto kun Esperantlingva teksto. Ni vizitis la tombejon kaj fotis la tombon. Temas pri la tombo de Rudolf Ljubić (vidu la foton), kiu en la supra parto, super la ĉefa tombotabulo, havas blankan ŝtontabulon, ĉe kies flankoj troviĝas verda kaj ruĝa steloj. La simboliko de la steloj certigas nin pri politika ideologio de la



forpasinto kaj pri lia esperantisteco. La surskribo ĉizita sur la blanka tabulo tekstas: "Vivu verda kaj ruĝa stelo, amo kaj paco nun regas sur la tero". Pri Rudolf Ljubić ni scias nenion, krom ke li vivis en Križevci dum longa tempo, kaj ke lia nomo aperis en la listo de membroj de loka Esperanto-societo en 1980-aj jaroj, kiam li estis jam tre maljuna (li naskiĝis en 1904). Esplorante iomete, ni trovis malnovan konstruaĵon kun fermita, senhoma kaj iom ruina loĝejo, kie sur la enirpordo ankoraŭ estis gluita la vorto "Esperanto". Laŭ nefidindaj informoj, li venis el Zagreb, kaj lia filo nuntempe vivas en Slavonio (Orahovica?). Ĉu iu scias ion pli detale pri la malnova samideano?

La redakcio

Mi volas laŭdi vin pro la tre bona kaj grafike altnivela revuo "Zagreba Esperantisto". Kiam oni prenas ĝin mane, oni emas trafoliumi kaj eĉ... legi ĝin. Aparte mi deziras danki al vi kaj al la diligenta verkinto Davor pro la bela kaj interesa eldonaĵo pri Japanujo. Bonvolu plusendi al li miajn impresojn. Mi ĵus legis partojn. Estas interese! Mi volas doni ĝin al lernantino, kiu finis la bazan kurson kaj ege progresas. Mi trovas la nivelon tre konvena por ŝi. Mi opinias ke ŝi ĝuos legi ĝin. Poste mi donos al aliaj. Havu daŭran fruktodonan laboron!

Josef Šemer (Tel-Avivo, Israelo)

Mi havas du lernantinojn kiuj ne havas komputilon, kaj ankaŭ ne scias uzi ĝin, sed ili dezirus korespondi per paperletero en Esperanto kun kroataj personoj, ĉar iliaj geavoj estis kroataj. Neide estas fraŭlino, pli od 60-jara, kaj ŝia kuzino Esmeralda estas vidvino, ankaŭ pli ol 60-jara. Neide kaj Esmeralda estas komencantoj kaj deziras plibonigi sian sperton pri Esperanto kaj koni aliajn personojn, precipe el Kroatio. Ili ankaŭ lernas kroatian lingvon per Esperanto. Se iu dezirus korespondi kun ili, jen iliaj poŝtadresoj: Maria Esmeralda Bellobraydic Bertoni, Avenida São Carlos, N. 2919 - casa 10, CEP 13.560-011 - SÃO CARLOS - SP - BRASIL kaj Neida Crnkovic, Avenida São Carlos, N. 2873, CEP 13.560-011 - SÃO CARLOS - SP - BRASIL.

Gilberto Menegasso (Brazilo)

 *Snježana Habulin*



BIBLIOTEKO SUR PLACO DE MARULIĆ

Sur Placo de Marulić, nomita laŭ la fondinto de kroata literaturo Marko Marulić devenanta el urbo Split (1450-1524), la 29-an de septembro 1913 estas konstruita nova domo de Reĝa universitata biblioteko, ornamita per verkoj de la plej eminentaj kroataj artistoj (R. Frangeš, R. Valdec, V. Bukovac, M. Rački, M. K. Crnčić, B. Csikos-Sesia, R. Auer, O. Iveković, F. Kovačević, I. Tišov, B. Šenoa, M. Vodsedalek). Ĝi estas lokita en la kultura medio de la zagreba “verda hufofero”, laŭ escepta arkitektura ideo de Rudolf Lubynski, kiu per ĝi realigis apartan kulturelpaŝon de Zagrebo al la unua jardeko de la dudeka jarcento. La unuaj postuloj pri memstara konstruaĵo (la biblioteko ĝis 1773 troviĝis sur Katarina-placo, en la konstruaĵo de la nuntempa supraŭra gimnazio, kaj ekde 1883 en la konstruaĵo de la nuntempa Rektorejo) devenas de la tiutempa direktoro Ivan Kostrenčić (1874-1911), la unua kiu faris regularon de la Biblioteko, konforme al la strukturo de aŭstria bibliotekoj. Dum la 19-a jarcento la Biblioteko ampleksiĝis per multaj donacioj (inter kiuj esceptas tiuj de Josip Sermage, Eleonora Patačić kaj Maksimilijan Vrhovac, kaj merite de Iso Kršnjavi per aĉeto de la bibliotekoj de Anton Springer, banuso Nikola Zrinski kaj Ljudevit Gaj). Kostrenčić en siaj streboj estis subtenita de Velimir Deželić, la unua direktoro de Reĝa universitata biblioteko sur Placo de Marulić. La bibliotekisto fariĝis Matija Smodek, kiu la librofonduson konformigis al tiutempaj bibliotekaj reguloj. La unua vera modernigo sekvis dum absolutismo de Bach, kiam laŭ leĝa preskribo ĝi fariĝis ĉefa landa biblioteko kun konstanta monsubteno kaj kun la titolo “Bibliotheca nationalis”. En 1875 al ĝi estis aldonita ankaŭ la posedaĵo de la Muzea biblioteko, fondita en la tempo de iliria movado. Ekde 1914 en la ejoj de Universitata biblioteko troviĝas ankaŭ “Metropolitana”, riĉa libro- kaj dokumento-kolekto de Kaptola metropola preĝejo. Nacia kaj Universitata Biblioteko ĉe Placo de Marulić n-ro 21 funkciis ĝis la 17-a de februaro 1996, kiam Zagrebo ricevis novan, modernan Universitatan bibliotekon.



NOVA NACIA KAJ UNIVERSITATA BIBLIOTEKO

Malfermo de nova konstruaĵo de Nacia kaj Universitata Biblioteko, la dua kiu en la 20-a jarcento akceptis nacian librotrezoron, permesis komparacian aliron kompare kun la antaŭaj konstruaĵoj samkiel ankaŭ pravigon de la atributo “Biblioteko por la 21-a jarcento”. Moderneco de la nuntempo estas alispeca ol de pasinto, kaj inter la secesie belaj konstruaĵoj sur Placo de Marulić kaj la nova en Strato de Kroata Frata Unuiĝo, kies arkitekturan identecon subskribas M. Hrzić, Z. Krznarić, D. Mance kaj V. Neidhardt, malfacilas fari paralelon. Komparo de la nova kaj malnova konstruaĵoj altrudas kontraston kiu en egale malfacila maniero tuŝas ĝian eksterajn kaj internajn. Diference de la konstruaĵo sur Placo de Marulić, fondita sur tradicia bibliotekismo, en kiu libera aliro al libroj ne ekzistis, la nova - kun “libro manatinge”, kombinas malferman kaj ferman alirojn, proksimigante al angla tipo de biblioteko. La centra hejmo de kroata scio kontrapunktas al harmonia dupaŝo, tradicio kaj nuntempa teknologio, kaj samtempe ebligas malfermadon de nia unua presaĵo - “Misalo laŭ juĝo de roma kortego” el 1483, samkiel de pli modernaj, alireblaj per Interreto.

